



JARRAPORTO

KALENDARA JARO 2021

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam

Nederlando

www.tejo.org

Esperantujo, la 11-an de februaro 2022

Ĉefkompilita de:

Livia Noghi, *TEJO-volontulo*

Rogier Hurman, *Ĝenerala Sekretario de TEJO*

Eroj verkitaj de:

Rogier Hurman (Roĉjo), *Ĝenerala Sekretario (2021-2022), Estrarano pri Informado (2020-2021)*

Michael Boris Mandirola, *membro de la Elekta Komisiono (2020-2021), Komisiito pri Aktivula Trejnado (ekde aŭgusto 2019)*

Marc Konijnenberg (Marko), membro de la Elekta Komisiono (2021-2022)

Veronika Venislovas, Kasisto (2021-2022)

Léon Kamenický, Prezidanto (2021-2022), respondeca Estrarano pri Rilatoj kun UEA (2021-2022)

Giorgio Nikolov (Ariel Palmer), Oficisto pri Komunikado (ekde 2017)

Mia Nordentoft, Oficisto pri AKSO kaj Tehniko (ekde novembro 2019)

Carlos Pesquera Alonso (Karlos), Subvencipetisto (ekde septembro 2021), respondeca Estrarano pri Kongresoj (2020-2021), Vicprezidanto (2020-2021)

Spyros Papadatos, Oficisto pri Eksteraj Rilatoj (ekde 2019)

Valentin Ceretto Bergerat, Volontulo en CO per ESK (aŭgusto 2020 - aŭgusto 2021), respondeca Estrarano pri Eksteraj Rilatoj (2021-2022)

Renato Guedes Filho, Volontulo en CO per ESK (septembro 2020 - septembro 2021)

Livia Noghi, Volontulo en CO per ESK (ekde oktobro 2021)

Wojciech Oreszczuk (Wojtek), Volontulo en CO per ESK (ekde oktobro 2021)

Klára Ertl, respondeca Estrarano pri Rilatoj kun Patronoj (2020-2021)

Tomáš Stano, Vicprezidanto (2020-2021)

Inès Elisabeth Kahin, Vicprezidanto (2021-2022)

David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri Aktivula Trejnado (ekde septembro 2021)

Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021)

Albert Stalin Tancinco Garrido, respondeca Estrarano pri Edukado kaj Scienco (2021-2022), respondeca Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021, 2021-2022)

Raoni Sousa, Komisiito pri Edukado

Snehaja Venkatesh (Snehaĝa), Komisiito pri Scienco (ekde oktobro 2020)

Manuela Burghilea, Komisiito pri Universitata Agado (septembro 2020 - aŭgusto 2021)

Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)

Alexandre Raymond (Alekcjo), respondeca Estrarano pri Kongresoj (2021-2022)

Michael Vrazitulis, Komisiito pri UNITED (oktobro 2020 - oktobro 2021)

Rakoen Maertens, Komisiito pri KER-agado ĉe UN kaj Unesko

Nicolas Kasolene (Nickson), Komisiito pri IKRJO (ekde septembro 2021), Komisiito pri Talento (ekde septembro 2020)

Ana Ribeiro, Komisiito pri UNOY (ekde 2018)

Arya Bhaskara Ferduzi, vickomisiito pri Landa Agado en Azio-Ociano (2021-2022)

Rogener Pavinski, Redaktoro de Kontakto (2011-2021)

Paweł Fischer-Kotowski, redaktoro de Kontakto (ekde 2021)

Marcionilo Vasconcelos, Redaktoro de Movada Rubriko (ekde aprilo 2018)

David López Rueda kaj Luana França, Komisiitoj pri Genra Egaleco (ekde majo 2021)

Rafael Lima, membro de Tutmonda Egaleco (marto 2021 - septembro 2021)

Soraya Alvarez, Komisiito pri Alireblo (ekde oktobro 2020)

David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri Liberen (oktobro 2020 - marto 2021)

Briac Millon (Brijako), Komisiito pri Adoleska Agado (2020-2021)

Provlegita de:

Marc Konijnenberg

Enhavlisto

Enkonduko	5
Parto 1: Funkciado	6
Administrado	6
Balotado por la nova estraro	6
Cirkulero	6
Malferma Horo de la Estraro	6
Elekta Komisiono 2020-2021	6
Elekta Komisiono 2021-2022	7
Kunlaborplatformo	7
Komitato	7
Komitatkunsidoj	7
Estrarkunsidoj	7
Realigplano	8
Statuto kaj reglamento	8
Financoj	8
Oficistoj	9
Dungoj	9
Ariel Palmer	9
Mia Nordentoft	11
Paulína Jalakšová	12
Carlos Pesquera Alonso	12
Spyros Papadatos	13
Volontuloj	15
Loĝado kaj laborkondiĉoj	16
Alvoko kaj elektoj	16
Lernado kaj volontulado (2021)	16
Valentin Ceretto Bergerat	17
Renato Guedes Filho	19
Livia Noghi	21
Wojciech Oreszczuk	21
Rilatoj kun UEA	22
Rilatoj kun Patronoj	22
AKSO	23
Parto 2: Komisionoj	24
Aktivula trejnado	24
Edukado, Scienco kaj Kulturo	25
Edukado	25
Scienco	25

Kulturo	26
Universitata Agado	26
Kongresoj	26
IJK 2020	26
Retoso 2021	27
Partoprenu IJK-n 2021	27
IJK 2021	27
IJK 2022	27
IJK 2023	28
Pasporta Servo	28
Eksteraj rilatoj	28
UNITED	29
UN & Unesko	29
Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj (IKRJO)	29
UNOY	30
Forumo Junulara Eŭropa (FoJE)	30
Landa kaj faka agado	31
Afriko	32
Azio-Oceanio	32
Eŭropo	33
Ameriko	33
Informado	33
Retpaĝo	33
Kontakto	34
Movada Rubriko	35
Projektoj	35
Projektoj kun Konsilio de Eŭropo (KdE) (2020-2021)	35
Projektoj sub Erasmus+ (2021)	37
Talento	37
Egaleco (2021)	38
Genra Egaleco	38
Tutmonda Egaleco	39
Alireblo	39
Liberen	40
Adoleska Agado	40
Apendico	41
Kromnomoj de personaj nomoj	41
Mallongigoj de nomoj de organizoj kaj organoj	41

Enkonduko

raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Ĝenerala Sekretario (2021-2022)

La jaro 2021 estis denove defio por la tuta mondo. La pandemio plu efikis al nia agado, ĉefe pri renkontiĝoj, sed ankaŭ en aliaj laborkampoj. Tamen ĝi ne malhelpis realigi gravan agadon: du retaj kongresoj, tri sukcesaj seminarioj, multaj prezentaĵoj de komisionoj kaj denove fluo de bonaj filmetoj en sociaj retoj. Elektiĝis nova estraro, akceptiĝis daŭre novaj volontuloj kaj dungigiĝis nova oficisto.

Sur la horizonto aperas iuj novaj defioj: ebla vendo de la Centra Oficejo, necerta situacio pri venonta administra subvencio, kaj mankantaj homfortoj. TEJO, konsistante el ĝiaj estraranoj, komitatanoj, oficistoj, volontuloj kaj aliaj aktivuloj, havas la forton kaj agademon por alfronti tiujn problemojn, same kiel ĝi alfrontis kaj travivis la pandemiajn jarojn.

Kio pli okazis dum la jaro? Nu, la specifaj detaloj pri tio atendas vin en tiu ĉi Jarraporto de la jaro 2021.

Ĝuu la legadon!

Parto 1: Funkciado

Administrado

raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Ĝenerala Sekretario (2021-2022)

Balotado por la nova estraro

La estraro estas la ĉefa plenuma instanco de la organizo. Dum la periodo 2021–2022 la estraranoj, elektitaj rete de la Komitato de TEJO inter la 1-a kaj la 6-a de aŭgusto 2021 estas:

- Léon Kamenický – Prezidanto;
- Albert Stalin Tancinco Garrido – Vicprezidanto;
- Inès Kahin – Vicprezidanto;
- Rogier Huurman (Roĉjo) – Ĝenerala Sekretario;
- Venislovas Veronika – Kasisto;
- Valentin Cerreto-Bergerat – Estrarano;
- Matheus Arantes Pacheco – Estrarano;
- Alexandre Raymond (Aleĉjo) – Estrarano;
- Uriel Gurdián – Estrarano

Cirkulero

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri sia agado publike. Iliaj raportoj aperas kiel monata cirkulero dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj de 2021 estas legeblaj en [Centra Reto](#).

Malferma Horo de la Estraro

En 2021, okazis malfermaj horoj de la Estraro:

- 16-a de majo 12:00-13:00 UTC
- 29-a de decembro 14:00-15:00 UTC

Elekta Komisiono 2020-2021

raportas Michael Boris Mandirola, membro de la Elekta Komisiono (2020-2021)

La Elekta Komisiono kiu oficis ĝis la IJK 2021 konsistis el Charlotte Burton, Michael Boris Mandirola, Vít Guiguelmo Mišurec kaj Tamiris Maciel Queiroz.

En 2021, la Elekta Komisiono laboris por la estraraj elektoj por la mandato 2021-2022.

La Elekta Komisiono verkis kaj disvastigis malferman alvokon, krome la Komisiono listigis 88 konsiderindajn aktivulojn kaj kontaktis la plejmulton el ili, proponante kandidatiĝon kaj petante sugestojn pri konsiderindaj kandidatojn (tiel kreskigante la liston).

Sen neceso plilongigi la alvokon, la Elekta Komisiono, ricevis 11 kandidatiĝoj: 9 viroj kaj 2 virinoj inter 23 kaj 33 jaroj el 4 kontinentoj.

La kandidatoj estis intervjuitaj de la Elekta Komisiono kiu sekve preparis unuan raporton por la Komitato, kun rekomendoj pri la kandidatoj kaj proponataj teamoj por kovri la diversajn fakojn. Tamen, pro retiriĝo de unu kandidato, necesis poste sendo de dua versio de la raporto kiu tamen ankaŭ ampleksis plilarĝiĝon de la disponebloj de la kandidatoj. Fine estis konkurencaj balotoj por la postenoj de vicprezidanto kaj de senofica estrarano.

La Elekta Komisiono ankaŭ okupiĝis pri kolektado de prezentiĝmaterialo de la kandidatoj kaj pri organizado de malfermaj horoj kie komitatanoj kaj ordinaraj membroj havis ŝancon levi siajn demandojn al la kandidatoj.

Elekta Komisiono 2021-2022

Raportas Marc Konijnenberg (Marko), membro de la Elekta Komisiono (2021-2022)

La Elekta Komisiono mem estis elektita sabaton la 7-a de aŭgusto dum la retaj komitatkunsidoj kadre de la reta IJK de 2021; elektiĝis Marc Konijnenberg, Hans Becklin, Tamiris Maciel Queiroz kaj Ana Ribeiro. Ne okazis kunsido kun la antaŭa Elekta Komisiono. Ĉiuj membroj de la Elekta Komisiono planis ĉeesti JES 2021-2022 kaj tie eklabori, sed la evento nuliĝis. Ne estis bezono tuj aktiviĝi en 2021, ĉar ne okazis demisioj.

Kunlaborplatformo

La [Centra Reto](#) estas la platformo uzata de TEJO-aktivuloj por registri rolojn, plenigi cirkulerojn kaj rete voĉdoni. En 2021 okazis 13 retaj voĉdonoj, el kiuj 8 estis kadre de la reta Komitatkunsido.

Komitato

En 2021 ne okazis elekto por komitatanoj, sed okazis kelkaj nomumoj de komitatanoj A kaj de anstataŭantoj.

Komitatkunsidoj

Okazis unu Komitatkunsido:

- en julio kaj aŭgusto rete per Zoom dum IJK 2021 [\[protokolo\]](#);

Rolis kiel kunsidestro Kirill Novichenko.

Estrarkunsidoj

En 2021 Estrarkunsidoj okazis komence en ritmo de du semajnoj, kaj dum la nova mandato en ritmo de tri semajnoj. Fizika transdona estrarkunsido okazis en Roterdamo, Nederlando

de la 27-a ĝis la 31-a de aŭgusto, en kiu ĉeestis kaj elirantaj, restantaj kaj enirantaj estraranoj. Jarfine la estraro planis fizikan estrarkunsidon dum JES, kiu tamen iĝis reta tuttaga estrarkunsido je la 29-a de decembro.

Regulaj retaj estrarkunsidoj okazis je la 11-a kaj 27-a de januaro, 10-a kaj 24-a de februaro, 13-a kaj 26-a de marto, 11-a de aprilo, 3-a kaj 22-a de majo, 14-a kaj 26-a de junio, 12-a kaj 26-a de julio, 19-a de septembro, 10-a de oktobro, 7-a kaj 28-a de novembro kaj 19-a de decembro.

Realigplano

Dum la transdona estrarkunsido ekkreiĝis realigplano en reta tabelo, kiun estraranoj dum postaj monatoj uzadis kaj pliplenigis. En decembro Wojtek kreis el tio [realigplanon en la formo de dokumento](#).

Statuto kaj reglamento

Dum la IJK estis proponitaj [tri ŝanĝoj al la reglamento pri elekto de Komitatanoj B](#), por posta reta voĉdono. Ĉiuj tri estis malakceptitaj kun malgranda diferenco. En novembro estis proponita nova reglamento pri malfermaj alvokoj, kiu ne estis akceptita. La propono estos prilaborita por poste denove proponi ĝin. Dum la lasta estrarkunsido Roĉjo diskutis reglamentajn ŝanĝojn kun aliaj estraranoj, kaj poste prezentis la ideojn dum la malferma horo.

Financoj

raportas Veronika Venislovas, Kasisto (2021-2022)

Mi transprenis la kasistan rolon (zorgi pri buĝetado, financa raportado, librotenado; kontroli, aprobi kaj repagi kostojn al membroj, volontuloj kaj oficistoj, kaj kostojn en la CO, TEJO-apartamento kaj Volontula Domo (VolDom); sekvi alvenon kaj uzon de subvencioj kaj donacoj) ekde septembro.

En 2021 la ĉefaj enspezoj de TEJO venis de subvencioj (ESK-subvencio, EACEA-subvencio), membrokotizoj kaj subtenoj de kundungoj de oficistoj. En 2021 ni sukcese petis de la ESK-programo subvencion por 3 volontuloj (ĉi tiu volontula programo daŭras de la 1-a de septembro 2021 ĝis la 31-a de decembro 2022), kaj de EACEA administran subvencion por 5 kunsidoj kaj 3,5 oficistoj kun la sumo 50,000 EUR. Ni ricevis 80% de la subvencio dum la jaro, kaj post aprobo de la fina raporto estas ricevontaj la ceteron. La du subvencioj helpas kovri parton de la kostoj de volontuloj, oficistaj salajroj, kaj estrarkunsidoj. La finaj sumoj de la subvencioj estos informitaj post la aprobo de la fina raporto. Ni ankaŭ petis la EACEA-subvencion por la kalendara jaro 2022, la rezulton de la subvencipetado ni ekscios ĝis majo 2022. Detaloj pri la evoluo de aktivo/kapitalo/spezo de TEJO dum 2021 aperos en financa raporto.

Oficistoj

raportas Léon Kamenický, Prezidanto (2021-2022), kaj la oficistoj

Dungitoj

Superrigardo pri dungoj en 2021:

- Giorgio Nikolov (Ariel) – Oficisto pri Komunikado (tutjare)
- Paulína Jalakšová – duontempa Oficisto pri Subvencioj (ĝis julio)
- Carlos Pesquera Alonso – duontempa Oficisto pri Subvencipetoj (ekde septembro)
- Saïd Balouchi – 82,5%-tempa Kunordiganto de CO-Volontuloj; Oficisto de UEA kaj TEJO (ĝis decembro)
- Spyros Papadatos – plentempa (ĝis Aŭgusto) kaj sekve duontempa Oficisto pri Eksteraj Rilatoj de UEA kaj TEJO (tutjare)
- Mia Nordentoft – plentempa Oficisto pri AKSO (tutjare)
- Vincent – interfacca programisto

TEJO havis en 2021 entute 7 dungitojn, el kiuj Vincent estas nur por malmulte da horoj (kvarontempa studenta laboro) kaj subtenas nian teknikan oficiston, Mia (kies ĉefa okupo estas teknika gvidanto de la AKSO projekto).

Paulína, duontempa Oficisto de Subvencioj, finis sian rolon en Julio. Ŝian laboron transprenis Karlos kiu kandidatiĝis en malferma alvoko por la posteno.

Saïd, Kunordiganto de Volontuloj kaj Oficisto ĉe UEA, ankaŭ konkludis sian rolon en decembro. Li estos anstataŭigita per Clément Baleyte kiu ekoficas la 1-an de februaro 2022 (pli da detaloj troviĝas en sekcio pri Volontuloj).

Spyros dum somero petis ŝanĝon de sia kontrakto de plentempa al parttempa. La estraro ne kontraŭis la peton kaj pretigis novajn dokumentojn.

Kiel menciite en la sekcio pri Financoj, la salajrokostojn de la dungitoj oni kovris de pluraj fontoj el kiuj la ĉefaj estas: administra subvencio kaj aranĝoj kun UEA. La dua rilatas ne nur al AKSO-kontrakto, sed ankaŭ al la fakto ke kelkaj oficistoj dediĉas parton de sia labortempo al UEA-taskoj, t.e. deĵoras por ambaŭ organizoj, TEJO kaj UEA.

La kasisto de TEJO kunlabore kun la Ĝenerala Direktoro de UEA kaj TEJO atente kontrolas la financadon tiel ke ne okazu "duobla" financado, t.e. ke la proporcioj de kunfinancado estas klaraj.

Ariel Palmer

raportas Giorgio Nikolov (Ariel Palmer), Oficisto pri Komunikado (ekde 2017)

Enhavoj kaj agado

Dum 2021, kiel jam en la antaŭaj jaroj, TEJO-komunikado havis ĉefe du flankojn: Praktika komunikado (projektoj, agado, alvokoj, membriĝo, retejo, ktp) kaj Originalaj enhavoj (filmetoj,

artikoloj, afiŝoj, intervjuoj, grafikaj materialoj, starigo de diskutoj, aktiva interago kaj konektado de uzantoj en sociaj retejoj).

Komence de la jaro ni kreis membriĝkampanjon ([filmeto](#) kun pluraj kontribuoj, afiŝoj en esperantaj revuoj, afiŝoj en sociaj retejoj) kaj ĝi tre bone funkciis kaj atingis plurajn novajn homojn.

Mi okupiĝis pri kreado de grafika identeco de niaj retaj eventoj [Retoso](#) kaj [IRIS](#), kunlabore kun la organizteamoj. Sekve de tio, ni organizis varbadon por la retaj eventoj kun realigo de pluraj afiŝoj en sociaj retejoj, reklamfilmetoj, programeroj, grafikajoj, ktp.

La plej viglaj partoj de la jaro el komunika vidpunkto certe estis ĉirkaŭ niaj retaj eventoj Retoso, IRIS kaj poste ĉirkaŭ IJK, pro la granda kvanto de okazaĵoj kaj enhavoj. Retaj eventoj certe estis brilaj momentoj de nia movado dum 2021, kaj sendube ili vigligis kaj instigis intereson pri Esperanto kaj TEJO el pluraj flankoj. La rolo de nia organizo en tio estis doni platformon al homoj por ke ili interkonatiĝu kaj amuziĝu kune (dum Retoso kaj IJK) kaj por ke ili esprimu sian fakan kaj akademian kompetenton (dum IRIS), donante ankaŭ al ĝenerala publiko valorajn enhavojn. La rolo de komunikado en tio estis: krei identecon de la platformo; instigi homojn kontribui; varbado de la eventoj; varbado de la enhavoj. Mi esperas ke retaj eventoj iĝu konstanta parto de la agado de TEJO en la venontaj jaroj.

Ni daŭrigis produktadon de la novaĵserio de TEJO "Enmovade", en kiu TEJO-estraranoj kaj aliaj aktivuloj rakontas pri sia agado kaj kunhavigas spertojn kaj ideojn. Ni jam havas [10 epizodojn](#) de ĝi.

Komunikado rilate al la sciencaj prelegoj de TEJO ĉiam kreas bonegajn rezultojn kaj instigas komentojn de aprezo kaj intereso en ĉiuj platformoj. Tio estas klara indiko de la elstara laboro de la komisiono de TEJO pri Scienco. Mi kredas ke tiu agado plialtigis la nivelon de nia organizo kaj la percepto kaj fidindeco de ĝi tra niaj sekvantoj kaj membroj.

Ni faris kromajn filmetojn kun kontribuoj de niaj sekvantoj: videon pri [esperantaj adoleskuloj](#), kiu estis bone ricevita, kaj filmeto kontraŭ [rasismo](#), okaze de projekto de UNITED.

Ni kreis ankaŭ lastan epizodon de la serio [Esperantistoj kaj Kronviruso](#).

Ni kreis kun Karina [filmeton pri la Esperanto-kurso en Duolingo](#), kiu ricevis bonegajn komentojn kaj multajn spektajn en Youtube kaj Facebook. Pro ĝia temo kaj enhavo, ĝi atingis multajn komencantojn kaj lernantojn de Esperanto, kaj utilis ankaŭ por krei iun komencan ligon inter ili kaj TEJO. Tiaspeca enhavo estas utilega kaj por TEJO kaj por lernantoj, do mi varme esperas ke ni produktos pliajn tiajn filmetojn estontece. La defio estas ke, por ke tiaj videoj estu bonkvalitaj kaj vere utilaj, ili postulas multe da laboro en la kreado de skripto kaj en la muntado, kaj kompreneble en disponeblo de lerta homo kiu kapablu paroli klare kaj bone antaŭ kamerao (Karina estas elstara en tio).

Projekto kiu estis tre bone ricevita estis la filmeto pri la [Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj](#). La laboro pri la video estis longa (interago kun kontribuantoj, asigno de artikoloj, kolekto de materialo, adapto de la materialo, kreado de subtekstoj, muntado, ktp.), sed la fina rezulto estis aprezita pro ĝia valoro kaj kvalito.

Ni kreis denove [Zamenhoftagan filmeton](#) kun pluraj kontribuoj el la tuta mondo. Tio ankaŭ postulis sufiĉe multe da laboro sed estis bone ricevita kaj pluraj el la partoj de la filmeto estos uzitaj ankaŭ por membriĝkampanjo. Malpli da homoj partoprenis en ĝi kompare al pasintaj jaroj, kredeble ĉar multaj homoj jam partoprenis en la filmeto pri homaj rajtoj, kaj/aŭ

eble ĉar jam por 5 sinsekvaj jaroj ni faras tian filmeton kaj eble necesos fari paŭzon, aŭ ŝanĝi la formaton, aŭ eble abandoni ĝin entute kaj krei ion tute novan.

Varbado pri la videoj estis diversa. Kelkaj videoj estis alŝutitaj nur al YouTube, aliaj al YouTube kaj Facebook, aliaj al YouTube, Facebook kaj Instagram. Por multaj el la videoj, krom la video mem, mi kreis t.n. "teaser" por Instagram (mallonga kunmetaĵo de momentoj de la video por instigi spektadon en alia platformo, ĉefe YouTube).

Kiel jam en la antaŭaj jaroj, krom videoj, mi kreis enhavojn kiel starigon de demandoj kaj diskutoj, ktp. kaj aktive kunhavigis kaj helpis disvastigi enhavojn jam kreitajn de homoj en la Esperanto-komunumo.

Dum la dua parto de la jaro ni komencis ankaŭ varbadon por IJK2022, kun afiŝoj kaj kampanjoj por fruaj aliĝoj.

Daŭris kompreneble ankaŭ la kutimaj instituciaj TEJO-enhavoj kiel informoj, alvokoj, varbado pri aktivajoj ktp. Kiel kutime, mi faris diversajn grafikaĵojn dum la jaro laŭ petoj de la estraro. En tejo.org mi kreis alvokojn kaj artikolojn, kaj aldonis paĝojn kaj informojn pri aktivajoj kaj helpis varbi por ili. Pro la fokusiĝo pri videoj, ĉi-jare mi faris malmultege da citaĵo-bildojn kaj gramatikaĵojn.

Mi verkis proponojn por nova Komunika plano kiun mi prezentis al la nova estraro.

Dum la jaro mi faris plurfoje kampanjetojn en Instagramo por interkonatiĝo de esperantistoj, kiu estas alia bonega maniero por videbligi junajn esperantistojn kaj krei konektojn inter ili.

Aldone, parto de mia laboro por TEJO estas ankaŭ interagi kun uzantoj en sociaj retejoj, varbi kaj kuraĝigi homojn partopreni en la aktivajoj de TEJO, respondi al demandoj, konekti homojn, ktp.

Atingoj

En 2021 ni atingis rekordan nombron de novaj abonantoj en Youtube (1600), kun ĉirkaŭ 95 mil totalajn spektojn de la filmetoj. Ni nun proksimiĝas al 4500 abonantojn. Por la unua fojo en la historio de nia kanalo, niaj filmetoj atingis 1 milionon da aperoj/impresoj ("impressions"). Unu kroma atingo estas ke YouTube decidis rekomendi nian filmeton pri la [Duolingo-generacio](#) kaj tio alportis multajn novajn spektojn kaj homojn al nia kanalo.

En Instagram ni havas aparte bonajn rezultojn kaj interagojn kun sekvantoj, kaj tie venas plejmulto de novaj homoj (krom en Youtube). Sekvantoj kreskis bone kaj regule ankaŭ en Twitter. En Facebook ili kreskis malpli kompare al pasinta jaro, supozeble pro tio ke nia celgrupo uzas malpli kaj malpli Facebook (kie nuntempe multe pli kutimas malpli junaj aĝgrupoj). Do indas certe eksperimenti ankaŭ kun novaj platformoj.

Mia Nordentoft

raportas Mia Nordentoft, Oficisto pri AKSO kaj Tehniko (ekde novembro 2019)

En la jaro 2021, ni faris plurajn el la plej grandaj paŝoj al funkcie finita AKSO. Je la fino de la jaro restis nur 1 granda funkcio nefarita, kiu devas esti preta antaŭ la lanĉo, nome Spezfolioj kaj perantoj. Pri tio antaŭvideblas pria progreso ene de la unuaj du monatoj de 2022.

Tra la jaro ni finis gravajn partojn de la sistemo, interalie: Revuoj, voĉdonsistemo, delegita reto, memfaraj ŝanĝoj al siaj personaj datumoj, gazetaraj komunikoj, tutaŭtomata aliĝilo, tutaŭtomata pagsistemo (AKSO-Pago) kaj la statika enhavo de la nova uea.org.

La laboro pri AKSO en 2021, same kiel en antaŭaj jaroj, estis funkciigita kadre de kerna teamo de du programistoj: Vincent (programisto kaj grafikisto kiu ĉefe okupiĝis pri la interfacoj por AKSO-Administranto kaj la nova uea.org) kaj mi (programisto de la datumbazoj, API kaj ĉio cetera; kaj kunordiganto de la projekto). La kerna teamo krome regule kunlaboras kun la estraroj de TEJO kaj UEA, la volontuloj de TEJO en CO kaj diversaj aliaj volontuloj kaj aktivuloj de TEJO.

Krom la laboro pri AKSO mi ankaŭ okupiĝis pri diversaj aliaj teĥnikajoj de TEJO, interalie: La bonfarto de la servilo de TEJO (en kiu kuŝas la retejo tejo.org kaj subretejoj ĉe *.tejo.org, retpoŝto de TEJO, daŭra prizorgado de la Centra Reto (reto.tejo.org) kaj diversaj aliaj teĥnikaj bezonoj de TEJO neantaŭvideblaj.

Paulína Jalakšová

raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Ĝenerala Sekretario (2021-2022)

Ĝis junio 2021 Paulína estis la subvencipetisto de TEJO. Interalie pro sia elektiĝo kiel estrarano de FoJE ŝi forlasis la postenon. Laŭ kontribuoj al la cirkuleroj Paulína faris almenaŭ:

- Verkado de jarraporto
- Verkado de raporto por administra subvencio kaj rilataj tradukado kaj aliaj taskoj
- Kandidatiĝo por interkontinenta projekto KA2 ene de Erasmus+ pri klimato kaj migrado. Ĝi ne estis akceptita.
- Esploro pri ebla UNAOOC-subvencio
- Ekkreo de kurso pri seksismo en lingvo por Aktivula Akademio
- Verkado de malferma alvoko por nova subvencipetisto
- Diversaj administraj, esploraj kaj subtenaj taskoj por TEJO

Carlos Pesquera Alonso

raportas Carlos Pesquera Alonso (Karlos), Subvencipetisto (ekde septembro 2021)

Rilate al la volontuloj kadre de la programo de Eŭropa Solidara Korpuso, ekde septembro 2021 ni pretigis la alvenon de la antaŭe elektitaj volontuloj (Livia kaj Wojtek). Tio inkludas akordon kun sendaj organizoj, pretigo de la kontraktoj kaj subskribo de la kontraktoj antaŭ ilia alveno la 6-an kaj 20-an de oktobro. Cetere, post liberigo de ĉambro en la Volontula Domo, ni pretigis alvokon kaj elektis Lenka, ktp. kiu komencis la volontuladon la 1-an de januaro 2022.

Rilate al projektoj, en oktobro ni kandidatiĝis por projekto KA1, kiu estis preparita kaj sendita por la antaŭa limdato sed ne ricevis akcepton pro manko de buĝeto. Temis pri projekto pri efika informado estrita de SKEJ kun aliaj 6 organizoj. Ĝi estis malakceptita.

Ni komencis la preparadon de projektoj por la venonta jaro kadre de la programo Erasmus+, kun pretigo de alvoko por partopreni en projektoj, organizado de ideoj, ktp. Ili fokusiĝis en 3 proponoj por KA1 projektoj kaj unu KA2.

Rilate al la administra subvencio ni kandidatiĝis kadre de la nova plano, kiu iĝis multe pli kompleksa rilate al la pretigo de la kandidatiĝo sed la subteno kiun oni povas ricevi altiĝis. Malgraŭ tio, la kvanto da mono kiun oni dediĉas al tiu fonduso ne grandiĝis. Alivorte, la oportuno ricevi subtenon per tiu fonduso malaltiĝis.

Helpante al Spiros kiel oficisto pri Eksteraj rilatoj, pro la ŝanĝo de Spiros de plentempa al duontempa, mi pretigis alvokojn por studsesio en Budapeŝto (poste nuligita) kaj trejnado en Danio. Aldone mi respondecis pri la organizado de la trejnado en Danio pri homaj rajtoj.

Spyros Papadatos

raportas Spyros Papadatos, Oficisto pri Eksteraj Rilatoj (ekde 2019)

La pozicio de KER-oficisto estis kreita en 2018, sed mi laboras en ĉi tiu pozicio ekde septembro 2019. 2021 do estis la dua plena jaro laboranta por TEJO kaj mi povas raporti laŭe. Mi daŭre laboras de Bruselo, sed ankaŭ ĉi-jare kompreneble estis markita de KOVIM-19. Ĉiuj fizikaj eventoj de marto 2020 ĝis hodiaŭ estis nuligitaj, do la laboro translokiĝis tute interrete. Tio certe efikas sur la kvaliton de la laboro, ĉar eksteraj rilatoj fariĝas pli bone persone, sed la situacio estas la sama por ĉiuj, do ni ne estis misproporcie trafitaj. La situacio estis la sama por ĉiuj universale.

Ĉi tiu raporto estas sumo de mia laboro, kiun vi ankaŭ povas trovi en miaj diversaj monataj raportoj en Centra Reto.

Ni daŭrigis kunlaboron kun institucioj, kaj en eŭropa kaj tutmonda niveloj. Ni daŭre forte kunlaboris kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj ni pliiĝis nian ĉeeston kaj kontaktojn ankaŭ en la Unuiĝintaj Nacioj (UN).

Kun la KdE, en 2021 ni organizis

- 1) la retan seminarion 'Klimata Generacio' en majo 2021 (pri naturmedio kaj daŭripovo);
- 2) la trejnadon 'ALT_HRE' kun DEJO en aŭtuno 2021 en Danio (pri trejnado de junaj esperantistoj pri alternativaj aliroj pri Edukado pri Homaj Rajtoj);
- 3) la studsesion 'X-Lingvo 2' en decembro 2021 en Budapeŝto, Hungario (pri seksismo kaj parola komunikado).

Ni ankaŭ havas 4 pliajn KdE-projektojn en 2022:

- 1) trejnado en printempo 2022 pri multnombraj diskriminacioj en Ĉeĥio.

- 2) jara laborplano kun 3 internaciaj agadoj (seminarioj kaj fakkunveno) por la tuta jaro 2022 pri la temo de tutmonda civitaneco post la KOVIM-19-pandemio.
- 3) internacia seminario en somero 2022 pri la temo de lingvaj rajtoj kaj demokratio en Nederlando.
- 4) Klimata Generacio 2, studsesio en aŭtuno 2022 pri naturmedio kaj homaj rajtoj en Budapeŝto aŭ Strasburgo.

Ni provos organizi ĉiujn supre menciitajn projektojn (aŭ la plimulton de ili) en Esperanto kaj por junaj esperantistoj. Aldone ni provos organizi ilin paralele al niaj jam ekzistantaj aranĝoj (kiel IJK) por pliriĉigi la enhavon de niaj aranĝoj kaj finance subteni la partoprenon de junaj esperantistoj en ili.

Alia granda parto de mia laboro ĉi-jare estis aferoj de UN en diversaj niveloj. Unue mi estis la ĉefa respondeculo pri la rilatoj kun IKRJO (kie ni estis en la IKRJO-taskaro kiel TEJO, kiu funkcias kiel la estraro de la platformo, por 2021-2022). Kun la subteno de Nickson, ni ĉi-jare aktive partoprenis en IKRJO kaj respondecis pri diversaj aferoj kaj ŝancoj de UN.

Pasintjare ni kunordigis la EKOSOK Junulara Forumo 2021 nome de IKRJO, kiu estis grava sukceso por nia KER kaj ni sukcesis krei novajn partnerecojn kaj kontaktojn ene de la UN-sistemo. Aldone ni havis fortan TEJO-delegacion de pli ol 20 junuloj ĉeestantaj la EKOSOK Junularan Forumon ĉi-jare.

Interalie ni ankaŭ havis bonan ĉeeston en la UN-sistemo partoprenante en la procezo LDC5, organizante 2 interretajn flankajn eventojn kun UEA pri lingvaj rajtoj (unu paralela al la EKOSOK Junulara Forumo kaj unu paralela al la Altnivela Politika Forumo) kiuj havigis al partoprenantaj TEJO-membroj parolajn ŝancojn (ekzemple al Nickson).

Ankaŭ mi kunordigis la rilatojn kun la Forumo Junulara Eŭropa (FoJE) ankaŭ ĉi-jare. Paulina elektiĝis en la FoJE-estraro kaj ni ankaŭ elektis sukcese Tuŝka en la FoJE-elektoj en aprilo 2021 por la Konsila Konsilio pri Junularo de la KdE por 2022-2023. Cetere ni partoprenas la politikajn agojn de FoJE, partoprenas ĝiajn kunvenojn, ĝiajn spertajn grupojn kaj ĝiajn aliajn iniciatojn.

Ni ankaŭ daŭrigas nian engaĝiĝon en la EU Junulara Dialogo, la politika procezo de EU por krei dialogon kaj spacojn por interrilatoj inter junuloj kaj politikistoj. Kune kun aliaj grandaj junularaj organizoj, ni estas nuntempe partneroj por la 8-a ciklo de la EU Junulara Dialogo (julio 2020-decembro 2021), ni rajtas sendi reprezentantojn de TEJO al la EU Junularaj Konferencoj ĉiun sesan monaton, formi la proceson kaj organizi konsultojn kun junuloj kaj politikistoj por alporti la voĉon de eŭropaj junuloj al EU. Ni ankaŭ estis elektitaj por daŭri kiel partnero, de januaro 2021 ĝis junio 2022.

Mi aldone subtenis la laboron de TEJO pri partoprenado en aliaj tutmondaj junularaj platformoj, kiel UNOY; Mi ĉeestis diversajn kunvenojn de la platformo kiam necesis, respondis al petoj kaj plenumis la petitajn taskojn kaj laŭeble subtenis la UNOY komisiiton, Ana.

Ĉi-jare, ni havas novan personon kiu laboras por TEJO per Erasmus+, Filipe, kiu estas nia Politika Asistanto (Policy and Advocacy Assistant). Mi administras la ĉiutagan laboron de Filipe kaj li laboras pri diversaj kampoj, kiel politikaj aferoj, verkante deklarojn aŭ aliajn politikajn dokumentojn, reprezentante TEJO ekstere kaj helpante kun KER, subtenante niajn daŭrajn eksterajn projektojn/subvenciojn kaj pli.

Pro la foriro de Paulina kaj la manko de nova subvencipetisto, mi devis transpreni ankaŭ multajn el la taskoj de Paulina en la lastaj monatoj. Mi kunordigis kaj redaktis la ESK Kvalitan Etikedon de TEJO kaj la subvencian peton por novaj volontuloj por 2021-2022 kaj ankaŭ subtenis interkontinentan projekton Erasmus+ KA2 kun multaj TEJO-sekcioj ĉirkaŭ la temoj pri migrado, daŭripovo kaj juneco inter Eŭropo kaj Ameriko.

Laste, mi provis doni al la estraro pli eksteran vidon pri la interna funkciado de la organizo kaj oficejo. Mi faris la jarajn ĝisdatigojn de TEJO en diversaj platformoj kiel la Travidobla Registro, la Eŭropa Junulara Fondaĵo, la Unio de Internaciaj Asocioj (UIA). Mi ankaŭ plenumas aliajn taskojn, pli-malpli rilatajn al mia laboro, kiam necesas.

Volontuloj

raportas Léon Kamenický, Prezidanto (2021-2022), kaj la volontuloj

Dum 2021 volontulis en TEJO jenaj personoj:

Kadre de Eŭropaj Solidaraj Korpusoj:

- Valentin Ceretto Bergerat (Francio), de aŭgusto 2020 ĝis aŭgusto 2021
- Renato Guedes Filho (Brazilo/Portugalia), de septembro 2020 ĝis septembro 2021
- Livia Noghi (Rumanio), de oktobro 2021 ĝis oktobro 2022
- Wojciech Oreszczuk (Pollando), de oktobro 2021 ĝis oktobro 2022

Kadre de franca civita servo (kunlaboro kun EKC):

- Emmanuel González (Manu) (Hispanio/Dominika Respubliko), de septembro 2020 ĝis decembro 2021

Kadre de speciala aranĝo kun UEA:

- Clément Baleyte, (Francio), oktobro - novembro 2021

En 2021 TEJO gastigis entute 6 volontulojn, el kiuj 4 partoprenis en volontula projekto - Eŭropaj Solidaraj Korpusoj - kunfinancita de Eŭropa Unio. Jarfine la estraro elektis plian volontulon kadre de la programo, kiu ekoficis la 1-an de Januaro 2022. Krom tio, TEJO aktive kunlaboras kun Esperanta Kulturcentro en Tuluzo kiu havas eblon sendi por mallongaj

periodoj eksterlande siajn volontulojn kadre de franca civita servo. Laste, TEJO kun UEA ankaŭ ofertis mallongan volontuladon al Clément Baleyte kiu dumoktobro kaj novembro 2021 liberis kaj proponis sian helpon kun modernigo de ĉambroj en la volontula domo, gastigo de novaj volontuloj kaj helpis klarigi al ili aferojn rilate al CO.

La nove elektita estraro decidis ke mastrumado kaj laboro kun volontuloj estos unu el la ĉefaj prioritatoj, konsiderante ke la retrokuploj de pasintaj volontuloj estis sufiĉe miksitaj. Pro tio oni enkondukis novan modelon de kunlaboro, en kiu ĉiu volontulo ricevas unu "estraran" mentoron (la rolon plenumis/as Ines, Valentin kaj Veronika). La fako estas kunordigata de Léon. Administraĵoj rilataj al la programo (ekz. kontraktoj) estas prizorgataj de Subvencipetisto, t.e. Karlos. Konsiderante ke Said decidis forlasi sian postenon en la CO, la estraro de TEJO tuj ekkomprenis ke oni devus rapide trovi novan kunordiganton de volontuloj. Tion rolon post pluraj preparoj akceptis Clément Baleyte, kiu estis efektive la nura persono kun sufiĉe forta profilo kiu en tiu momento disponeblis en la labormerkato.¹

Resume, **la teamo kiu zorgas kaj zorgos en 2022 pri volontuloj konzistas el:** Léon (estrara kunordiganto), Clément (surloka kunordiganto), Karlos (administrado), Valentin, Ines kaj Veronika (estraraj mentoroj).

Loĝado kaj laborkondiĉoj

Kiel menciite, volontuloj deĵoris en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo kadre de la Eŭropaj Solidaraj Korpusoj, programo kunfinancite de Eŭropa Unio. Ili ĉiuj loĝis/as en la Volontula Domo de UEA. Volontuloj nun ĝuas pli bonajn laborkondiĉojn ol antaŭe, ĉar la TEJO-oficejo en la Centra Oficejo de UEA moviĝis de malgranda ĉambro en la tria etaĝo al pli granda ĉambro en la dua etaĝo. Ni ankaŭ aĉetis novajn komputilojn por la laboro de la volontuloj kaj renovigis la ĉambrojn en la volontula domo.

Alvoko kaj elektoj

La publikigo de alvoko por novaj volontuloj por la eŭropa studjaro 2021-2022 okazis en julio 2021. Estis ses validaj kandidatiĝoj, el kiuj kvin pretis intervjuiĝi, kaj fine du el ili elektiĝis: Wojciech Oreszczuk kaj Livia Noghi. Krome en la monatoj aŭgusto-decembro deĵoris Manu, volontulo de EKC en Tuluzo.

Lernado kaj volontulado (2021)

La volontulado en 2021 havis aliajn defiojn ol dum kutima jaro. La malfacila pandemia tempo daŭrigis, kun konsekvencoj por ni ĉiuj, sed specife por volontuloj kiuj planis amuzan jaron vojaĝante tra Esperantujo, estis specife defia. Volontuloj kiuj ekoficis en nederlanda aŭtuno estis pli bonŝancaj en tiu senco, ĉar etaj eventoj jam povis fizike okazi kaj ili havis pro tio eblon partopreni en pluraj aktivajoj, ekz. studsesiojn pri homaj rajtoj en Danujo, pri egaleco en Hungario, aŭ en Erasmus+ projekto pri volontulado en Pollando.

Livia estis elektita kiel volontulo kun baza kono de esperanto. Pro tio oni decidis provizi al ŝi privatajn kursojn de Esperanto du semajnojn antaŭ ŝia alveno al Roterdamo. Tio montriĝis

¹ Lia dungo estos kunfinancita de UEA. 60% pagos TEJO kaj 40% UEA, konsiderante ke la posteno de li estos Kunordiganto de volontuloj kaj oficisto en la CO.

kiel bona praktiko, konsiderante ke ŝi venis kun mezbona nivelo de esperanto kaj sukcesis rapide transpreni diversajn taskojn.

Valentin Ceretto Bergerat

raportas Valentin Ceretto Bergerat, Volontulo en CO per ESK (aŭgusto 2020 - aŭgusto 2021)

Kompare kun la komenca triono de mia volontulado fine de 2020, la lastaj du trionoj en 2021 estis pli laborplenaj ĝenerale, ĉefe pro tio ke unu el niaj kolegaj volontuloj, Quentin, foriris de Roterdamo fine de 2020. Dum pli-malpli duono de 2021 restis nur Renato kaj mi por plenumi la taskojn antaŭe disigitaj inter ni tri, ĉefe rilate al la ĝenerala administrado de TEJO. Konsekvence, mi havas iom malpli da tempo por personaj projektoj, kiel videomuntado aŭ verkado de artikoloj.

La supre menciita ĝenerala administrado de TEJO inkludis miaflanke la jenajn taskojn, ofte disigitaj inter Renato kaj mi kaj esence samis al tiuj, kiujn ni jam plenumis mezefike en 2020: retpoŝtoj, membrodatumoj, teknika organizo de Estraraj Kunsidoj (EsKu), Komitatkunsidoj (KoKu) kaj protokolado, mastrumado de la kontoj de TEJO de ekzemple Zoom aŭ Eventa Servo, pakado de revuo Kontakto por forsendo, forsendoj de kelkaj pakajoj por UEA, amuziĝado kun la arkivoj de UEA kaj diversaj petoj de estraranoj laŭ la momentaj bezonoj.

Rilate al administrado, mi ĝenerale ofte devis trakti kelkajn ĝensekaĵojn. Ekzemple, mi estis komence de la jaro komisiita de la Ĝenerala Sekretario por instigi ĉiujn Komitatanojn kaj Estraranojn de TEJO remembriĝi en TEJO por 2021, ĉar ilia posteno postulas memkompreneble membrecon en nia organizo. Tio estas fakte ĉirkaŭfaza maniero diri ke mi virtuale ĝenade postkuris ilin, retpoŝte kaj telegrame, eĉ kelkfoje vane klopodis kontraŭ malaperintaj Komitatanoj.

Simile, okazis ke mi devis plurokaze verk(ad)i leterojn kaj mesaĝojn por dissendi kaj varbi membrojn.

Pli interese, kiel en 2020 mi daŭre tro aktive partoprenis la Komisionon pri Eksteraj Rilatoj (KER) kies monatajn kunsidojn mi organizis kaj protokolis dum preskaŭ la tuta mandato. Feliĉe ne nur administradon mi faris sed ankaŭ partoprenis la agadon mem, kiu estis tute reta pro evidenta pandemia kialo.

Notinde, okazis en aprilo la EKOSOK Junulara Forumo, dum kiu KER organizis dulingvan flankan eventon pri lingvopolitiko kunlabore kun UEA ([Lingvaj rajtoj kaj la junularo: Defioj kaj Oportunoj](#)). Tiu evento enplektis plurajn KER-anojn kiujn mi kunordigis, kaj homoj varbitaj tiuokaze. Antaŭ la evento mem mi ankaŭ kune prilaboris kelkajn administrajn dokumentojn kaj tradukis la prezentan noton en Esperanton. Dum la evento mem, mi estis teknikisto. Simile, julia evento de UN, la Altnivela Politika Forumo, estis okazo organizi plian Flankan Eventon ([La junularo por lingvaj rajtoj: la efiko de la pandemio KOVIM-19 kaj la vojo al resaniĝo](#)), ĉi-foje kun iom alia aliro. Mi plene rolis kiel ĉeforganizanto, kunordigante organizantojn, prelegantojn, apogite de KER-anoj kaj UEA.

Dum Retoso en aprilo mi ankaŭ kulise organize kaj teknike kontribuis al la programero de KER "[Ĉu ni uzu la anglan aŭ ni ataku ĝin?](#)". Pli persone, mi ankaŭ pretigis [prelegon pri la rilatoj Surinamo kaj Francio](#) por IRIS (okazante paralele de Retoso), kies pretigo prenis neracie tro

multe da tempo, sed tamen estis bela okazo plue spertiĝi pri video-muntado. Spektu ĝin, bonvolu.

Similan teknikistan kaj kunorganizadan rolon mi havis en majo okaze de la reta [Poliglota Kunveno](#), dum kiu KER organizis paneldiskuton titolitan "Ĉu ĉiuj lingvoj estas kreitaj egale? Diskriminacio kaj privilegio" kiun mi trilingve moderigis.

Daŭre en la KER-kategorio, mi estis unu el la tri delegitoj de TEJO okaze de la Konferenco de Membroj (KOMEM) de Forumo Junulara Eŭropa (FoJE) en aprilo. Aparte grava por TEJO estis tiu ĉi kunsida semajnfino, ĉar dum ĝi okazis la balotado de la venontaj membroj de la Konsilkonsilio pri la Junularo (AC) de Konsilio de Eŭropo (KdE).

Al tiu posteno kandidatiĝis nia Ĝenerala Sekretario Tuŝka, kiu petis mian subtenon, evidente pro manko de homoj pli kompetentaj ol mi. Antaŭ KOMEM, mi do reprezentis TEJO-n dum kelkaj pretigaj kunsidoj, babiladoj kaj kontribuis al pretigoj por la debato inter la kandidatoj. Ŝajne mia strebo ne estis senutila ĉar Tuŝka ja estis elektita por la 2022-2023 mandatperiodo. Mi ankaŭ ekkonis novajn vizaĝojn ekster la TEJO-medio survoje, do fine ĝi estis sufiĉe fruktodona evento.

Aliteme, mi ankaŭ partoprenis en kelkaj projektoj financataj de Konsilio de Eŭropo (KdE), plej signife al la loĝistika organizo de Klimata Generacio. La projekto enhavis 4 retajn kunsidojn, kiujn mi teknike mastrumis per Zoom kaj Gather, dulingve pretigis kaj kunmoderigis.

Alia longdaŭra tasko por KER estis la ĝisdatigo de la [kurso de TEJO pri eksteraj rilatoj](#), lom post iom, mi tralegis ĉiujn paĝojn de la kurso, rearanĝis ilin, ĝisdatigis informojn kaj ligilojn kaj aldonis paragrafojn laŭbezzone. Mi ankaŭ aldonis novajn erojn al la trejnado, fiere verkis novan eron pri la rilatoj de TEJO kun Eŭropaj Instancoj kaj ricevis aldonan kurseron de PEJ (Pola Esperanto-Junularo) pri la eksteraj rilatoj de landaj sekcioj de TEJO. Al tiu laborado helpis kelkaj aliaj KER-anoj per konsiloj, spertoj kaj provlegado.

La pandemio bedaŭrindege malebligis ĉiujn ĉeestajn aranĝojn, sed mi tamen havis feliĉan okazon vojaĝi en junio al Tuluzo, kie mi kunlaboris kun la volontuloj de la loka EKC (Esperanto Kultur-Centro) kaj flanke ĝoje esperantumis kun fizikaj homoj. La rezulto de tiu kunlaborado estis duobla. Flanke de EKC, [radio-elsendo](#) kie la eksa TEJO-volontulo Clément kaj mi estis intervjuitaj pri la agado TEJO kaj JEFO (Junulara Esperanta Franca Organizo, la franca sekcio de TEJO). Flanke de TEJO, estis [filmeto en nia Jutub-kanalo](#) pri la agado de EKC kaj de la lokaj volontuloj.

Fine de mia volontulado mi kunordigis la KER-programerojn de IJK (prelegoj, debatoj), kelkaj diskutoj pri la rolo de Esperanto estis aparte fruktodona. Mi ankaŭ partoprenis kelkajn diskutojn kadre de la Virtuala Kongreso (VK, reta UK). Grava finvolontulada tasko estis ankaŭ teknikaĵo dum la [mezjara Komitatkunsido](#), dum kiu mi elektiĝis kiel Estrarano por la posta mandato, sekve de intenca plurhoma lobiumado al mi.

Mia fina tasko estis kunordigi nian transdonan [Estraran kunsidon fine de aŭgusto](#), kiel kaj tiatempa volontulo kaj baldaŭa estrarano. Kiel volontulo, mi multe klopodis por surloke organizi la kunsidojn kaj volontulan domon, aĉetumi, trovi manĝejojn kaj kolekti informojn

de partoprenantoj. Kiel estrarano, mi partoprenis la kunsidojn, ĉefe pri ĝenerala kunordigado, eksteraj rilatoj, volontuloj kaj arkivado kaj pro tio, feliĉe ne devis protokoli.

Renato Guedes Filho

raportas Renato Guedes Filho, Volontulo en CO per ESK (septembro 2020 - septembro 2021)

Li alvenis al Roterdamo en septembro 2020, dum la unua ĉeesta estrara kunsido de la koncerna mandatperiodo. Ekde tiam li kaj la alia volontulo(j) helpis al la estraranoj pri administraj taskoj. Unu el la plej gravaj taskoj estis okupiĝi pri verkado kaj provlegado de la protokoloj ellaboritaj dum la virtualaj Estrarkunsidoj (EsKu). Dum tiuj kunsidoj, ili ricevis kiam necese aldonajn informojn pri siaj kurantaj taskoj kaj ricevis novajn indikojn pri tiuj plenumotaj. Rilate kunsidojn, li kune kun la alia volontulo ankaŭ ebligis la okazigon de Komitata Kunsido (KoKu) fine de novembro per teĥnika apogo, livero de protokolo kaj anticipaj testsesioj por partoprenantoj.

Krom la renkontiĝoj, la volontuloj prizorgis la retpoŝtan keston de la oficiala retadreso de TEJO kaj ankaŭ reprezentis la organizon en lokaj kaj internaciaj Esperantaj renkontiĝoj rete kune kun estrarano. Pli specife, Renato aldone zorgis pri la retpaĝo de TEJO, ĉefe pri la publikigo de novaj afiŝoj kaj aktualigante ĝiajn paĝojn kaj informojn.

Kadre de liaj ekskluzivaj aktivecoj por TEJO, li tradukis artikolojn por la revuo Unesko-kuriero kaj por Tutmondaj Voĉoj, verkis artikolon por Libera Folio, prelegis pri Esperanto en la Pernambuka Esperanto-Asocio, donis lecionojn pri Esperanto al nova staĝanto, kontribuis al la diskutoj okazantaj ĉe Egaleco, interalie proponante la revivigo de la projekto voĉlegita Vikipedio kaj helpis okazigi IRIS (Internacia Reta Interfaka Simpozio). Krome, Renato helpis en la sendado de naskiĝtagleteroj al patronoj de la organizo kaj zorgis pri la publikigo kaj aktualigo de la novaĵoj kaj afiŝoj ĉe la oficiala retpaĝo de TEJO.

Renato helpis UEA kiam bezonate, ekzemple pri pakado de revuoj, arĥivado de dokumentoj kaj pri la aktualigo de la voĉlegita versio de la revuo Monato.

Kadre de persona lernado kaj projektoj, li eklernis videomuntadon helpe de estrarano kaj atingis proksimume A1-B2 nivelon en la nederlanda lingvo.

Filipe Francisco

raportas Spyros Papadatos, Oficisto pri Eksteraj Rilatoj (ekde 2019)

Filipe estis nia Erasmus+ asistanto, inter marto kaj oktobro 2021. Li laboris pri politiko kaj pledado por TEJO kaj subtenis KER. Filipe redaktis plurajn deklarojn por niaj sociaj retoj okaze de Internaciaj Tagoj, li helpis en redaktado de subvencioj, li komencis ellabori politikan paperon por TEJO (sed ne kompletigis ĝin). Li ankaŭ helpis pri la ekstera reprezentado de TEJO en FoJE kaj li respondecis pri la EU Junulara Dialogo kaj la engaĝiĝo de TEJO tie.

Emmanuel González

raportas Guaroa Emmanuel González Cuevas (Manu), Volontulo en CO per Civita Servo (septembro 2021 - januaro 2022)

Mi komencis mian laboron kun la ĉeesta EsKu kiu komenciĝis la 27-an de aŭgusto. La unua monato de laboro estis intensa, mi devis lerni kiel estis organizata la laboro en la CO, krom tio dum septembro mi estis sola kiel volontulo pro la foriro de la malnova volontulo kaj la ankoraŭ onta alveno de Livia kaj Wojtek. Dum septembro mi ĉefe zorgis pri la kutimaj taskoj en la CO, kiel kontroli la (ret)poŝtkeston. Mi tamen helpis la oficiistojn pri kelkaj taskoj kaj ĉefe akompanis la novan estraron en la unua monato de ilia laboro kun taskoj kiel, interalie, transdoni aliron al la Google-konto kaj organizi la dosierujon. La monato finiĝis kun vojaĝo al la Esperanta Urbo Herzberg am Harz, kie mi partoprenis en la projekto VOLade (Volontulado kaj asocia daŭripov-evoluo) nome de TEJO kaj TORPEDO. Krom mia partopreno mi iris por registri kaj munti filmetojn por diskonigi la projekton kaj la laboron de la organizoj kiuj partoprenis kaj organizas ĝin. En tiu renkontiĝo mi registris kaj poste muntis filmeton por la serio "ENMOVADÉ". Mi montris en tiu filmeto la laboron de la Interkultura Centro Herzberg (ICH) kaj de la voluntulino, Jade Jannot, kiu tiutempe laboris en la asocio.

En oktobro, mia laboro rilatis al la muntado de la materialo kiun mi registris en la Itala Kongreso, ĵus antaŭ ol mi alvenis en Roterdamo, en la renkontiĝo en Herzberg am Harz kaj helpi la estraron kun laboro kiel protokolado dum kunsidoj, ekzemple de la estraro, de KER kaj de Egaleco. Mi tamen kontaktis estraranojn kiel Albert Stalin, Matheus aŭ oficisto kiel Ariel por proponi kelkajn projektojn kaj helpi en ilia laboro. Dum tiu tempo mi tamen laboris kun Paweł, redaktoro de Kontakto helpante per provlegado surloke kaj sendante provlegitajn artikolojn al li. La monato finis kun mia partopreno en la projekto pri Homaj Rajtoj kaj KKPS. Mia plej grava tasko dum tiu renkontiĝo estis registri materialon por la filmeto kiu aperis la 10-an de decembro rilate al la Internacia Tago pri Homoj Rajtoj.

Dum postaj monatoj mi faris la kutimajn taskojn kaj helpis al la estraranoj kun ilia laboro en pluraj fakoj. Mi komencis en novembro prepari la sekvan renkontiĝon de la projekto pri volontulado "VOLade" en kiu TEJO estas partnero. Mi tamen akceptis la proponon de Inès Kahin, aktivula trejnisto, trejni dum la TTT en Bjalistoko kaj iĝi TEJO-trejnistino, ĉar mi jam estis trejnisto ekster Esperantujo. Mia partopreno kaj trejnado iris sufiĉe glate laŭ la opinioj de la partoprenantoj.

Mia TEJO volontulado finiĝis rapide, laŭ mi. Dum mia lasta monato mi finis taskojn kiujn mi komencis dum pasintaj monatoj kiel la filmserio pri Civita Servo kaj ESK por diskonigi la projektojn kaj instigi pli da organizoj partopreni kaj ekakcepti volontulojn. En decembro mi finis mian volontuladon helpante al Wojtek kun la organizado de la JES-ero en Roterdamo.

Livia Noghi

raportas Livia Noghi, Volontulo en CO per ESK (ekde oktobro 2021)

Mi komencis mian ESK-volontuladon komence de oktobro 2021. Mi ne parolis Esperanton antaŭ ol kandidatiĝi, do antaŭ mia alveno al Roterdamo, mi havis intensan kurson de Esperanto - 12 lecionoj en 2 semajnoj. Mi daŭrigis miajn lecionojn ekde novembro, por plibonigi miajn lingvajn kapablojn.

Dum la komenca periodo de mia volontulado mi konatiĝis kun Esperantujo, TEJO kaj miaj taskoj. Krom la kutimaj oficejaj taskoj, kiujn TEJO-volontuloj havas en la Centra Oficejo, iom post iom, mi ricevis aliajn, kiel prizorgi la Zoom-konton de TEJO, Eventa Servo-konton, ĝisdatigi la retpaĝon, traduki kelkajn materialojn, ktp.

Unu el la plej gravaj respondecoj ĝis nun estis partopreni en la organiza teamo de la studsesio "X-lingvo: La efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado", la dua parto de Konsilio de Eŭropo-projekto, kiu okazis en Budapeŝto, en decembro. Alia grava tasko estis partopreni kiel kromdelegito de TEJO en la Eŭropa Junulara Forumo, kiu signifis ke mi partoprenis en diversaj kunsidoj kaj unu el la plej grandaj aranĝoj de EYF, la Konsilio de Membroj (COMEM).

La naturo de miaj taskoj estas plejparte administra. Lastatempe mi ricevis taskon rilatan al AKSO, plejparte enigi kaj kontroli datumojn en datumbazo(n), kaj la sekva granda tasko estos la kunadministrado de alia projekto de TEJO por la Konsilio de Eŭropo, seminario pri lingvaj rajtoj kaj demokratio.

Wojciech Oreszczuk

raportas Wojciech Oreszczuk (Wojtek), Volontulo en CO per ESK (ekde oktobro 2021)

Ĉefaj aktivecoj ekde la komenco de la volontula periodo (la 20-a de oktobro):

- partopreno en dana kunveno KKPS, kaj kiel partoprenanto kaj kiel aldona organiza helpanto kaj fotisto;
- ĉiutaga servo de oficejaj taskoj: pritraktado de ricevata poŝto kaj retpoŝto, laborfluo de dokumentoj, sendado de pakajtoj, ordigado de oficejaj spacoj;
- "Kontakto": pritraktado de ricevataj tekstoj por provlegi, dissendado de la nova numero, verkado de unu propra artikolo;
- skanado de arĥivoj de TEJO-Tutmonde (finita);
- taskoj por Ĝenerala Sekretario: protokolado de retaj estraraj kunsidoj, kunpreparado de nova realigplano;
- Komisiono pri Eksteraj Rilatoj: respondecoj de sekretario - planado kaj organizado de ĉiumonataj kunsidoj, kunkreado de tagordo, protokolado dume;
- konsiderinda agado ĉe KER: aldonaĵoj al KER-referencilo, reta partopreno en eventoj - "CoNGO" (konferenco de NROj ĉe UN) kaj unua kunsido de komisiono pri lingvoj ĉe UN;
- subvencipetado: ekis preparado por subvencipetado de Erasmus+ projektoj; helpado por subvencipetistoj de KdE-administraj subvencioj;
- ekde la fino de decembro, laŭ interkonsento de TEJO/UEA, mi helpas en kelkaj taskoj de UEA pro foriro de Said Baluĉi (unu el UEA-oficistoj) de sia posteno;
- organizado de silvestra/novjara evento en Roterdamo pro la nuligita JES. Bedaŭrinde pro la subita efektivigo de novaj KOVIM-restriktoj en Nederlando, ankaŭ tiu evento ne povis okazi kiel planite;

- laboroj pri ĝisdatigo de TEJO-retpaĝo komenciĝis;
- Partopreno en reta leciono de Esperanto-kurso en Ĉeboksaro, Ĉuvahio (Rusio);
- aliaj devoj devenantaj de ESK-reguloj: kunsidoj kun mentoro, kvintaga alventrejnado;

Rilatoj kun UEA

raportas Léon Kamenický, respondeca Estrarano pri Rilatoj kun UEA (2021-2022)

La du ĉefaj temoj kiujn la nunaj observantoj de TEJO ĉe la estraro de UEA (t.e. Léon kaj Roĉjo) devas sekvi estas kaj takti estas **sukcesa lanĉo de AKSO** kaj **eventuala forvendo de la CO en Roterdamo**.

Ambaŭ temoj bezonis komence de la estrara mandato 2021-22 iom pli da atento, ĉar aperis pluraj malklaraĵoj al kiuj la pasintaj estraranoj ne havis klarajn respondojn. Rilate al AKSO oni devis trovi novan modelon de kunlaboro kaj atenti pri tio ke estraroj de UEA kaj TEJO regule sekvu la evoluan de la projekto. Oni kune preparolis kiel plibonigi la kunlaboron kaj estis tre pozitiva vidi ke ambaŭ flankoj faris maksimumon por objekte taksu kial la lanĉo de AKSO prenas malfruon. La rezulto de la preparoloj estis ke oni decidis ŝovi la oficialan lanĉon de AKSO al dua kvartalo de la jaro 2022 por doni tempon al ĉiuj flankoj korekti siajn erarojn, revizii atendojn kaj surbaze de tio klare komuniki al la teknika teamo kion oni atendas de la projekto.

Eventuala forvendo de la CO en Roterdamo estas temo kiu ankoraŭ ne havas klaran rezulton. Al Fernando kaj Martin ni prezentis ni komunikis niajn bezonojn kaj planojn. Baze, plej grava estas regula kaj klara komunikado pri la temo tiel ke TEJO sukcesu bone antaŭvidi kiel plie agi. La nunaj inteskonsentoj kun la reprezentantoj de UEA estas, ke okaze de vendo de la CO oni:

- Gardas la nunan volontulan domon kiun TEJO luas kaj uzas por realigi volontulan programon de Eŭropaj Solidaraj Korpusoj,
- Konsultos kun TEJO kiel solvi pri nova sidejo (ĉu translokiĝo al teretaĝo de la nuna volontula domo, aŭ aliloken),
- Kune trovos solvon por garantii taŭgajn laborlokojn por TEJO-volontuloj.

Krom la du temoj, Léon kaj Veronika regule kunlaboras kaj komunikas kun Martin (Ĝenerala Direktoro de UEA) por pritrakti diversajn praktikaĵojn (surlokaĵoj en Roterdamo, financaj aferoj, dungoj, ks.). La kunlaboro estas tre fruktodona kaj malferma.

Rilatoj kun Patronoj

raportas Klára Ertl, respondeca Estrarano pri Rilatoj kun Patronoj (2020-2021)

Dum mia mandato mi strebis fortigi daŭran kontakton kun niaj Patronoj. En la jaro 2021 okazis:

- sendado de retmesaĝo aŭ poŝtkarto por ĉiu patrono je sia naskiĝtago, tra la volontuloj de TEJO en CO;

- Jarkomence kampanjo por patroniĝo, samtempe kun la kampanjo por membriĝo, tra ĉiuj niaj kutimaj kanaloj;
 - Intervjuado de kvar patronoj, kiu aperis en [Esperanto \(2021:3\)](#) kaj [Kontakto \(2021:1\)](#);
 - Malferma Horo por Patronoj rete en aprilo;
 - Reta Patrona Akcepto dum Virtuala Kongreso en julio;
 - Poŝtkarto al ĉiuj patronoj sendita de la fizika Estrarkunsido en Roterdamo en aŭgusto.
- Ĉiuj labordokumentoj rilate al Patronoj dum mia mandato konsultebblas en ĉi tiu [guglujo](#).

Krom tio, Patronoj ĝuas la samajn servojn kiel ĉiuj membroj de TEJO: abono al Kontakto, rabato al IJK, rajto paroli en komitatkunsidoj, membri en komisionoj, ktp. Vidu [Reglamenton de TEJO](#), parto 8: Patronoj.

AKSO

Raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Ĝenerala Sekretario (2021-2022)

La AKSO-projekto progresis en 2021, sed ankoraŭ ne atingis sian lanĉon. Mia Nordentoft restis la ĉefa programisto, kunordigante unu interfacprogramiston, Francesco Maurelli estis komisiito pri AKSO ĝis la elekto de la nova estraro.

Komence de 2021 ne estis tute klare, kiu estrarano respondecas pri AKSO, kaj la manko de estrara subteno malhelpis komunikadon kaj kunordigadon. Post Charlotte kaj Tuŝka jarmeze Roĉjo transprenis la respondecon, kaj estas nun ĉefa kontaktpersono por UEA, por Mia, kaj por aliaj TEJO-estraranoj.

Post kelkaj kunsidoj komence de la mandato la AKSO-situacio iĝis klara por la nova TEJO-estraro, kaj ekde tiam ree okazas regulaj AKSO-kunsidoj inter Roĉjo, Martin Schäffer, Fernando Maia Jr. kaj Aleks Kadar. Mia ne ĉeestas sed antaŭe raportas al Roĉjo pri progreso kaj problemoj.

La plejparto de la funkcioj necesaj antaŭ la lanĉo estas nun pretaj, sed restas ankaŭ cimriparado, instalado de infrastrukturo, movado de datumoj kaj verkado de gvidlibroj por fari. UEA kaj TEJO kune celas lanĉi AKSO-n post la aktiva remembriĝperiodo komence de 2022.

Parto 2: Komisionoj

Aktivula trejnado

raportas Tomáš Stano, Vicprezidanto (2020-2021), Michael Boris Mandirola, Komisiito pri Aktivula Trejnado (ekde aŭgusto 2019), Inès Elisabeth Kahin, Vicprezidanto (2021-2022) kaj David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri Aktivula Trejnado (ekde setembro 2021).

La komisiono (trejnistaro) konsistas el trejnistoj, kiuj estas gvidataj de "estrareto", gvidata en 2021 de Michael Boris Mandirola kaj Sasha Murr. Post septembro 2021, la respondecon transprenas Inès Elisabeth Kahin kaj David Ruíz i Sánchez.

La komisiono pri aktivula trejnado fokusiĝis pri la liverado de trejnadaj aranĝoj, ĉefe fokusitaj al retaj eventoj Retoso, reta JES kaj reta IJK. Pro malmulte da intereso flanke de trejnistoj ne okazis multe da trejnadaj, la plej gravaj trejnadaj estis por novaj komitatanoj antaŭ retaj Komitatkunsidoj kaj ankaŭ trejnado pri Eksteraj Rilatoj, ĉefe pro tio ke multe da TEJOanoj partoprenas en oficialaj renkontiĝoj, kie oni reprezentas TEJOn kaj Esperanton.

Malentuziasmiĝo partopreni dum retaj trejnadaj kaj oficialaj eventoj de AT (ekz. TTR, ktp.) estis kaŭzita pro malemo partopreni retajn eventojn, ĉefe se homoj jam devas labori rete kaj ne plu volas sidi malantaŭ komputilo ankaŭ pliajn horojn. Aktivaĵoj de AT estas bazitaj je ĉeesta partopreno.

Fine de junio okazis en Tuluzo Trejnado de Trejnistoj kiu alportis al trejnistaro novajn trejnistojn, inter kiuj la nova respondeca estrarano kaj la nova komisiito pri aktivula trejnado.. Dank' al tio ni esperas je pliboniĝo de niaj servoj kaj pli da aktivaĵoj, kiuj alportos novajn membrojn.

En septembro transprenis la komisionon la nova estrarano pri Aktivula Trejnado (Inès Elisabeth Kahin) kaj la nova komisiito pri Aktivula Trejnado (David Ruíz i Sánchez).

Dumoktobre ni kreis kaj disvastigis formularon por kolekti informojn pri niaj TEJO-Trejnistoj, kaj tiel ĝisdatigis la datumbazon de la TEJO-Trejnistaro. Ni trovis 2 trejnistojn por ALT_HRE ('Alternativa Aliro al Edukado pri Homaj Rajtoj'), projekto financita de Konsilio de Eŭropo kiu okazis paralele al KKPS en Ry, Danio. Preskaŭ dudek trejnitoj lernis dum kvin tagoj pri Alternativa Aliro pri Edukado pri Homaj Rajtoj. David mem trejnis dum ĝi.

En novembro ni komencis la organizadon de la ĉeesta TTR (TEJO-Trejnistara Renkontiĝo). Ĝi okazis en decembro en Pollando kadre de Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj. Kadre de ĝi, la TEJO-volontulo Manu Guaroa oficiale iĝis TEJO-trejnistoj. Estis riĉa tago kun du trejnadaj kaj cerbuma kunsido.

En decembro ankaŭ okazis X-lingvo ('La efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado'), studsesio financita de Konsilio de Eŭropo kiu okazis en Budapeŝto. Ni trovis faciligantojn por la evento. Inès mem faciligis dum ĝi, aldone al (re)prezentado de TEJO.

Edukado, Scienco kaj Kulturo

raportas Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021) kaj Albert Stalin Tancinco Garrido, respondeca Estrarano pri Edukado kaj Scienco (2021-2022)

Estas 4 branĉoj en tiu ĉi grupo: Edukado, Scienco, Kulturo kaj Universitata Agado. Edukado estis tiu kun malpli da agado, sed la aliaj tri branĉoj, kiuj komencis plifortiĝi en 2020 (aŭ jam en 2019, se temas pri Universitata Agado), daŭrigis la laborojn komencintajn en la pasinta jaro.

Edukado

raportas Raoni Sousa, Komisiito pri Edukado, kaj Karina Oliveira, Estrarano (2019-2021)

Estis kunlaboro kun Ariel Palmer, oficisto de TEJO, por krei videon kiu aperis en la kanalo de TEJO en Youtube je la 12a de junio 2021: <https://www.youtube.com/watch?v=X2qJz1TeNxY>.

La video temis pri vortoj el Duolingo kiuj rilatas al specifaj aferoj en la Esperanta movado, kaj la celo de la video estis helpi la personojn kiuj lernas/is Esperanton per tiu ilo pli bone kompreni la signifon de tiuj vortoj.

Scienco

raportas Snehaja Venkatesh (Snehaĝa), Komisiito pri Scienco (ekde oktobro 2020)

En 2021 la komisiono daŭrigis sian prelegserion. Dum Retoso, la subkomisiono pri Scienco kaj la laborgrupo pri Universitata Agado kune organizis IRIS, kie multaj junuloj prelegis pri siaj fakoj. Dum IJK 2021, ni organizis konkurson, kiu enhavis simplajn taskojn, kiujn ĉiu partoprenanto povis provi.

Monato	Preleganto	Temo
Januaro	Marta Nowakowska	Terapia neŭrostimulacio: kiel uzi elektran kurenton por kuraci homojn
Februaro	Lucas Teyssier	Diversaj facetoj de la transformo de Fourier
Majo	Vicente Manzano-Arrondo	Oportuno kaj defio realigi plurfakan Esperantan sciencan revuon pri Interkultura Komunikado
Junio	Martin Constantino-Bodin	Ĉu vi fidus vian programlingvaĵon?
Novembro	Sabine Ogier-Collin	Novajaĵo pri la (surtera) konkero de la energio de

Kulturo

raportas Roĉjo, Estrarano (2020-2021)

Dum la reta JES komence de 2021 kreiĝis la ideo, havi pli ofte internacian vesperon aŭ ion similan. El tio naskiĝis la Kultura Horo de TEJO, reta simpozio por montri kulturajn kontribuojn. Ĝi okazis trifoje: je la 30-a de januaro, je la 27-a de februaro, kaj okaze de RETOSO je la 5-a de aprilo. Por postaj okazoj ne venis sufiĉaj kontribuoj, kaj ili ne okazis. La unua kaj dua Kulturaj Horoj estas spekteblaj en la jutuba kanalo de TEJO.

Universitata Agado

raportas Manuela Burghelea, Komisiito pri Universitata Agado (septembro 2020 - aŭgusto 2021)

La ĉefa projekto estis la realigado de IRIS, Internacia Reta Interfaka Simpozio, okazinta en aprilo dum Retoso, kiel kunlabora produkto de la komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo. Ni ricevis 25 videajn prelegojn kun daŭro de 5 ĝis 20 minutoj kaj ni okazigis plurajn podiajn diskutojn en interfaka perspektivo: lingvistiko; sociologio, antropologio kaj internaciaj rilatoj; astronomio; inĝenierarto, biologio kaj medicino; psikologio; matematiko kaj fiziko; fervojoj. Ankaŭ okazis diskuto pri Scienca Agado en Esperanto kunlabore kun UEA. Jen la retejo de la simpozio: <https://iris.tejo.org/>.

Ni tenis la Telegraman grupon pri Universitata Agado informita pri esperantologiaj studebloj, stipendioj, konkursoj, konferencoj, rilataj seminarioj kaj prelegoj. Ni ofte varbis pri ESF (Esperantic Studies Foundation).

Ni varbis pri la Interlingvistikaj Studoj de Poznano, per realigado de filmeto kunlabore kun finstudintoj, publikigita en julio: <https://www.youtube.com/watch?v=-cvm2ybeKcs>.

Ni kultivis kunlaboron kun aliaj esperantistaj grupoj laborantaj pri universitata agado, per partopreno en la simpozio de ILEI, "Esperanto en universitataj medioj - nuntempo kaj estonteco", en aŭgusto, kaj per fojfoja ĉeesto en la monata Kulpensigado de UEA pri Esperanto kaj Universitatoj.

Ekde septembro vakas la posteno de komisiito pri Universitata Agado.

Kongresoj

IJK 2020

raportas Rogier Hurman (Roĉjo), ĉeforganizanto de IJK 2020

Post la finkalkulo de IJK 2020 pasintjare okazis eta korekto en aŭgusto 2021, kaj estis iom da komunikado pri lasitaj kotizoj. NEJ-flanke ĉio estas fermita.

Retoso 2021

raportas Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), respondeca Estrarano pri Kongresoj (2020-2021)

El la sperto de la reta IJK, venis grupo de aktivuloj kiuj interesiĝis pri ripeti la sperton gastigi eventon kiu atingebblas por homoj de partoj de la mondo kiuj kutime ne havas sufiĉe da mono por partopreni grandajn internaciajn eventojn. El ĝi kreiĝis teamo kiu celis organizi grandan internacian retan eventon kiu fine nomiĝis "Retoso".

La evento ripetis la stilon de la IJK 2020, per uzo de la platformo retevent gastigita de E@I, dum pli mallonga tempo, de la 2a ĝis la 5a de aprilo. Retoso estis senkosta por membroj de TEJO kaj ĝi gastigis multajn programerojn kiel koncertojn, debatoj, ludadojn, ktp. Kun teamo de homoj el ĉiuj kontinentoj krom Antartiko, per ĝi TEJO atingis pli tutmondigi sian agadon en la celata linio de la kongreso kaj per lernado pri mastrumado de evento en ĉiuj horzonoj samtempe.

Partoprenu IJK-n 2021

raportas Mung Bui (Feliĉa), Kasisto (2017-2021)

En 2021 ne okazis konkurso PP IJK, ni intencis ŝovi la elektitajn kandidatojn de IJK 2020 al 2021, sed poste ankaŭ ne okazis surloka IJK 2021.

IJK 2021

raportas Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), ĉeforganizanto de IJK 2021 kaj respondeca Estrarano pri Kongresoj (2020-2021)

La jaro komencis kun realvoko post realvoko por organizi la IJKn 2021 pro la forfalo de la teamo de Koreio pro la pandemia situacio. Kun la teamo de Ukrainio elektita, la estraro komencis labori kun ili kun pluraj problemoj rilate al la pretigo de taŭga buĝeto. La estraro de TEJO decidis havis fiksan limdaton fine de marto por decidi ĉu la kongreso okazos fizike aŭ ne laŭ la evoluo de la pandemio. Post la atingo de la limdato kaj vidante ke la situacio rilate al la pandemio ankoraŭ ne estis sufiĉe akceptebla, la estraro decidis ke, ĉar malindis okazigi fizikan IJKn, ripeti la retan formaton.

Alvoko el la estraro serĉis novan teamon, kiu estis estrita de la estrarano pri kongresoj pro la manko da tempo. La formato de la kongreso estis tute nova, ĉar ĝi okazis en pli interaga platformo, gather.town. La kongresejo estis virtuala kreita el nenio kaj inkludis spacojn kiel en normala IJK (dancejo, prelegejo, gufujo...), ekskursojn (ĉiutage nova loko aperis por la esploro de la partoprenantoj), ludojn, labirintojn kaj multaj aliaj.

La IJK 2021 daŭris pli ol kutime (de la 30a de julio ĝis la 8a de aŭgusto), estis senkosta por individuaj membroj kaj patronoj de TEJO kaj atingis 294 aliĝintojn.

IJK 2022

raportas Rogier Huurman (Roĉjo), ĉeforganizanto de IJK 2022

La organiza teamo por IJK 2022 dormis dum la unuaj monatoj de 2021, kaj mallonge antaŭ IJK 2021 verkiĝis la bezonataj partoj de la retpaĝo. Aliĝilo ne aperis tiam, sed en oktobro dum KKPS, pro la necerta monda kronviroza situacio. Ekde oktobro ĉiumonate aperas novajletero por abonantoj kaj aliĝintoj.

Aliĝintoj en la unuaj dek tagoj ricevis promeson de senpaga T-ĉemizo, kaj tio rapide allogis pli ol kvindek homoj. En la resto de 2021 venis kelkdek pliaj aliĝoj. La enhavo de la retpaĝo ĉiumonate kreskas, kaj la sendado de invitleteroj komenciĝis en decembro.

IJK 2023

raportas Alexandre Raymond (Alekĉjo), respondeca Estrarano pri Kongresoj (2021-2022)

Alvenis nur unu propono, de Italio, responde al la invito organizi IJK-on en 2023. Tio estas verŝajne klarigebla pro la fakto ke post pandemio malfacilas klare plani la estontecon. La itala propono estas tre interesa, kaj loke (plaĝe, ne tiom for de la UK) kaj koste.

Pasporta Servo

raportas Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), Vicprezidanto (2020-2021)

Nenio estis farita pri Pasporta Servo ĉar, pro la pandemio, la uzo de la servo iĝis vere malaktiva.

Eksteraj rilatoj

Valentin Ceretto Bergerat, Volontulo en CO per ESK (aŭgusto 2020 - aŭgusto 2021), respondeca Estrarano pri Eksteraj Rilatoj (2021-2022)

Kiel volontulo en 2020-2021 Valentin rolis kiel kunordiganto de nia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) kaj pro tio multe spertiĝis pri la fako tiel ke oni iel konvinkis lin estraraniĝi en 2021-2022 por zorgi pri tiu ĉi fako. Pri la KER-umado dum tiu volontulado (flankaj eventoj, ĝisdatigoj KER-kurso) legeblas en la taŭga ero en la sekcio pri Volontuloj.

Pri KER-aktivado dum la estaraneco de Valentin, pluraj eroj legeblas en la subaj laŭorganizaj sekcioj. Ĝenerale, estis klopodo enplektigi la novajn volontulojn en KER-agado. Livia kaj Wojtek plurfoje reprezentis TEJO-n en aliorganizaj kunsidoj (notinde de FoJE & CoNGO) kaj Wojtek kontentige transprenis mian sekretarian rolon (protokolado, organizo de kunsidoj).

Unu el la tiuamdataj streboj estas ankaŭ (re)difini kaj difini la eksteran linion de TEJO, do oni unue entreprenis kunigi kaj resumi la diversajn oficialajn KER-ecajn dokumentojn de nia organizo en [tiu Referencilo](#). Ĝi celas estis kaj referenco por reprezentantoj de TEJO kaj lernomaterialo por novaj aktivuloj, kaj aliflanke utili al mi mem por studi la oficialajn jam ekzistantajn poziciojn de TEJO antaŭ olo prilabori novajn. Post tio, kelkaj KER-aktivuloj ekis projekton reverki kaj pluprofondigi la [lingvopolitikajn poziciojn de TEJO](#) okaze de trejnado pri Homaj Rajtoj kadre de KKPS, en Danio (vidu sekcion "Projektoj"). La projekto daŭras komence de 2022 kaj estas planita malferma laborgrupo pri la temo ĉirkaŭ la unua Komitatkunsido de 2022.

Aldone de nura enkomisia aktivado menciendas la diversaj projektoj (dank' al financado de Konsilio de Eŭropo kaj laborado de Spyros) kiuj estas sufiĉe interfakaj (vidu sekcion "Projektoj").

UNITED

raportas Michael Vrazitulis, Komisiito pri UNITED (oktobro 2020 – oktobro 2021)

Kadre de kampanjo kunordigita de UNITED, la Eŭropa Ago-Semajno kontraŭ Rasismo (*European Action Week Against Racism*), TEJO publikigis alvokon por kontribui al filmeto konsciiganta pri la spertoj de homoj trafataj de rasisma diskriminacio. Pri la alvoko kaj la rezultinta filmeto UNITED ankaŭ mem informis per sociaj retoj kaj sia fina kampanja raporto.

Dum VK 2021, okazis trejna kaj informa prelego pri la agado de TEJO ene de UNITED.

Malferma alvoko je novaj kandidatiĝoj por la posteno de komisiito pri UNITED okazis en oktobro/novembro.

UN & Unesko

raportas Rakoen Maertens, Komisiito pri KER-agado ĉe UN kaj Unesko kaj Valentin Ceretto Bergerat, Volontulo en CO per ESK (2020-2021), Estrarano (2021-2022)

Post pluraj jaroj da laboro, ni sukcese atingis "Specialan Konsultan Statuson" ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK), la ĉefa sekretariejo de la Unuiĝintaj Nacioj. Tio signifas, interalie, ke TEJO nun, sendepende de UEA, ratjas eniri kaj partopreni en eventoj en la UN konstruaĵoj de Novjorko, Vieno, kaj Ĝenevo, kaj sendi siajn proprajn reprezentantojn memstare. Ni tial komencis serĉi kaj varbi novajn reprezentantojn de TEJO ĉe UN-urboj, kaj nomunis Hans Becklin kiel nian reprezentanton en Novjorko.

Sekve de tio, TEJO membriĝis en CoNGO (*Conference of Non-Governmental Organizations in Consultative Relationship with the United Nations* - Konferenco de Neregistaraj Organizo en Konsulta Statuso kun UN) en novembro, kun aktiva subteno de UEA. Ni komencis ĉeesti kaj enplektiĝi en CoNGO-aktivaĵojn, interalie la Ĝeneralan Konferencon de CoNGO fine de novembro kaj en la laborgrupo pri lingvoj.

Krom la akreditiĝo ĉe Ekosok, ni organizis, partnere kun UEA, flankan eventon dum du altnivelaj konferencoj de la Unuiĝintaj Nacioj. La unua okazis dum la 10-a Ekosok Junulara Forumo ("[Lingvaj rajtoj kaj la junularo: Defioj kaj oportunoj](#)"; 6-an aprilo 2021), kaj la dua dum la 2021 Altnivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo ("[La junularo por lingvaj rajtoj: La efiko de la pandemio KOVIM-19 kaj la vojo al resaniĝo](#)"; 12-a julio 2021). En ĝi partoprenis dekoj da diversaj organizaĵoj, kaj komencis laboron al konstruado de nova Lingva Alianco inter organizaĵoj kiuj agadas ĉe UN.

Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizo (IKRJO)

raportas Nicolas Kasolene (Nickson), Komisiito pri IKRJO (ekde septembro 2021)

Trovita en la bonaj manoj de Papadatos, oficisto pri Eksteraj Rilatoj, la komisiono estis gvidita de li ĝis septembro 2021, kiam la respondeca Estrarano Valentin prenis kontrolon kaj establis Nickson Kasolene kiel komisitito. La oficisto Papadatos kaj la Estrarano Valentin

kunlaboris kaj gvidis la komisiiton Nickson pri kiel funkcias *IKRJO* kaj donis klarigojn pri tiu respondeco. Per tiu triopa kunlaborado TEJO plenumis taskojn kaj partoprenis retkunvenojn kadre de IKRJO. Interalie, proklami la kampanjojn kaj organizi kunvenon kun junuloj el diversaj landoj pri la 5a Konferenco de UN por Malevoluantaj Landoj en la Mondo. Kaj multaj aliaj taskoj en kiuj TEJO montris sian aktivecon kadre de IKRJO.

UNOY

raportas Ana Ribeiro, Komisiito pri UNOY (ekde 2018)

La jaro 2021 ankoraŭ estis sufiĉe malnormala pro la pandemio, kaj denove pluraj ĉeestaj kunsidoj kaj eventoj de la reto ne povis okazi, kaj malpli da laboro estis farita rilate al tio. Tamen kelkaj aferoj ja estas raportindaj.

En marto de 2021, mi kaj Spyros skribis du subvencipetojn al programo pri etaj projektoj de UNOY, al kiuj eblus ricevi kompenson de ĝis 1000 eŭroj por realigi ilin. Unu subvencipeto temis pri preparado de lernmaterialoj por esperanto, kaj la dua temis pri providi interretkonekton al junuloj el landoj kiuj tiuj ne facile atingebblas. Bedaŭrinde neniu el la projektoj estis akceptitaj al tiu projekto. UNOY remalfermos tion ĉi jare, kaj se vi havas pli specifajn ideojn de projektoj rilate al packonstruado kaj esperanto kiuj povus ricevi monhelpon de 1000 eŭroj por esti sukcesaj, bonvole skribu al mi.

En aŭgusto de 2021, TEJO kune kun aliaj organizoj subskribis peticion de UNOY kiuj pledis por paco en Afganujo. La peticion oni povas legi ĉi tie: <https://unoy.org/urgent-statement-for-afghanistan/>. Mi ankaŭ skribis noton al la Movada Rubriko de Revuo Kontakto rilate al tio.

Krome, daŭra kontakto inter TEJO kaj la reto estis tenata, kiel partopreno de reta regiona membrkunsidoj, plenumado de formularoj, ktp. Tio estis farita ĉefe de Spyros kaj mi.

Forumo Junulara Eŭropa (FoJE)

raportas Tomáš Stano, Vicprezidanto (2020-2021) kaj Valentin Ceretto Bergerat, Estrarano (2021-2022)

Pro KOVIM-19 pandemio, KOMEM okazis rete dum semajnfino en aprilo. Estis sufiĉe grava KOMEM por TEJO, ĉar ni kiel organizo sendis kandidaton por AC (En la angla "Advisory Council"). Kandidato estis tiama nia ĝenerala Sekretario Konstanze Schönfeld. Pro tio niaj aktivajoj en FoJE komencis iom pli frue ol atendite. Ni (Tomáš, Valentin, Spiros kaj Konstanze) aktive partoprenis en kunsidoj de Interŝanĝgrupo, al kiu TEJO apartenas. Kunsidoj temis pri nia komuna strategio rilate al elektoj kaj ankaŭ esti spaco por prezenti ideojn kaj ĉefe, plani

intervjuojn kun aliaj kandidatoj. Dum tiu ĉi KOMEM, mi (Tomáš) havis rajton voĉdoni rilate al ĉiuj aferoj.

Dum KOMEM, krom elektoj, okazis ankaŭ aliaj aferoj, ĉefe diversaj laborgurpoj, kiujn gvidis FOJE-estraranoj. Tamen granda parto de la kunveno estis elektoj, kiujn ni povas konsideri kiel sukcesajn, ĉar Konstanze sukcesis eniri AC-n, kie ŝi estos aktiva ekde de la komenco de la jaro 2022. Ĝenerale mi pensas, ke TEJO sukcesis prezenti sin en tiom granda kunveno, malgraŭ tio ke ni ne sukcesis partopreni la eventon ĉeeste kaj espereble TEJO nur plifortigos sian voĉon en Eŭropa Junalara Movado.

Aldone de tiu unua KOMEM, la dua KOMEM de 2022 okazis hibride, parte ĉeeste en Belgio, parte rete. Surloke representis Valentin kaj rete Livia, kies detalajn raportojn pri la evento legeblas respektive [ĉi tie](#) kaj [tie ĉi](#). Koncize, tiu evento estis reprezente kaj spertige grava por ĵus ekoficiintaj estrarano kaj volontulo, eĉ se konkretaj atingoj ne similis al la elektiĝo de Konstanze en aprilo.

Landa kaj faka agado

raportas Albert Stalin Tancinco Garrido, Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021, 2021-2022)

Fine de la jaro 2020 elektiĝis Albert Stalin Garrido kiel nova estrarano pri Landa kaj Faka Agado. Poste, frue en 2021 estis (re)nomumitaj novaj vickomisiitoj pri landa agado Abyssinie Ahonon (Okcidenta Afriko), John Magessa (Orienta Afriko), Jeong Jaehyun (Azio-Oceanio), Javier Ramos Nistal (Norda kaj Centra Ameriko), kaj Alexandre Raymond (Sudameriko), dum daŭre restis vakaj la posteno pri Ĝenerala Komisiito kaj vickomisiito pri Eŭropo. Pro la ligiteco en esperantista agado inter Azio kaj Oceanio, oficiale sub la Azia-Oceania Komisiono de UEA, interalie ne plu estas apartaj komisiitaj postenoj inter Azio kaj Oceanio.

Post la nova estrara mandato (2021-2022) Garrido daŭre restis la respondeca estrarano pri LFA, kvankam ekestis ŝanĝoj en la konsisto de la Komisiono. Fine de 2021 la jenaj aktivuloj respondecas kiel komisiitoj:

- **Ĝenerala Komisiito:** *vaka*
- **Komisiito pri Faka Agado:** *vaka*
- **Afriko (Okcidenta):** Abyssinie Ahonon (Benino)
- **Afriko (Orienta):** John Magessa (Tanzanio)
- **Ameriko (Norda & Centra):** *vaka*
- **Ameriko (Suda):** *vaka*
- **Azio-Oceanio:** Arya Bhaskara Ferduzi (Indonezio)
- **Eŭropo:** *vaka*

En julio la Komisiono lanĉis la plej novan kaj reformitan version de KODEJO, la Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizo, kiu enhavis novajn demandojn pri la efiko de la pandemio de COVID-19 sur landajn kaj fakajn junularajn organizojn tra la tuta mondo en la jaro 2020. KODEJO 2020 konsistis el tri malsamaj demandaroj: KODEJO 1 (Ĝenerala

Demandaro), KODEJO 2 (Informado kaj Varbado), kaj KODEJO 3 (Financoj). La demandarojn respondis entute 19 junularaj organizoj, 17 landaj kaj 2 fakaj. La raporto pri KODEJO devus esti publikigita fine de oktobro, sed la publikigo estis prokrastita ĝis plej frue januaro 2022 pro diversaj kialoj.

Afriko

Raportas Albert Stalin Tancinco Garrido, respondeca Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021, 2021-2022)

En 2021 oni vidis la (re)aktiviĝon de du junularaj organizoj: Senegala Esperanto-Junularo (SEJ) kaj Malaga Esperanto Junulara Asocio (MEJA).

Azio-Oceanio

raportas Albert Stalin Tancinco Garrido, Estrarano pri Landa kaj Faka Agado (2020-2021, 2021-2022) kaj Arya Bhaskara Ferduzi, vickomisiito pri Landa Agado en Azio-Oceanio (2021-2022)

La jaro 2021 estis ege vigla jaro por la azia junularo.

La plej brila atingo estis la ekokazigo de la "Sudorientazia Gufujo" (per la iniciato de du indoneziaj esperantistoj, Arya Bhaskara Ferduzi kaj Rizki Maulana), kies unua sesio okazis la 24-an de aprilo vespere per Zoom. En tiu sesio partoprenis pli ol 30 junuloj el Filipinoj, Indonezio, Orienta Timoro, Singapuro, Tajlando, kaj Vjetnamio, interalie. La temo estis: "Kiel estis via sperto en Esperantujo ĝis nun?" La iniciato montriĝis sukcesa kaj daŭripova, ke pliaj 6 sesioj okazis dum la jaro sub la organizado de Ferduzi, kiu poste iĝis vickomisiito pri landa agado en Azio-Oceanio. Pliaj informoj pri la iniciato troviĝas ĉe paĝo 7 de "Esperanto en Azio" n-ro 111 (aprilo 2021) kaj paĝo 249 de la revuo "Esperanto" (decembro 2021).

Tuj post la sukcesa iniciato de la menciita Sudorientazia Gufujo ankaŭ naskiĝis dediĉita servilo por la Azia-Oceania Junulara Komunumo en Discord, en kiu membras 59 homoj tra Azio, Aŭstralio, kaj Novzelandoj, interalie. La servilo ebligas konstantan komunikadon inter aktivuloj de multaj landoj kaj havas diversajn temrilatajn kanalojn, ekzemple: Movado, Teknologio, Muziko, Manĝaĵoj, ktp. La servilo havas ankaŭ landajn kanalojn, en kiuj samlandaj esperantistoj povus informi pri siaj venontaj lokaj agadoj aŭ simple krokodili babilante. La servilo daŭre restas aktive uzata danke al ĝiaj administrantoj kaj konstantaj babilantoj.

Pli frue en aprilo okazis la programero "Malkovru la ĉinan junularon" dum Retoso. Partoprenis en la programo tri ĉinaj junuloj: Gao Shuyuan (Elle), reprezentantino de Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA), Song Zhenyuan (Rimedo), studento de la Esperanto-fako de Zaozhuang-Universitato, kaj Zhao Wenqi (Venki), tiama komitatano Ĉ de TEJO. La ĉinaj partoprenantoj prezentis siajn aktivadojn en diversaj lokoj de Ĉinio, precipe en universitatoj.

La celo de la programero estis interalie prezenti ĉinajn junulojn, respondi demandojn, kaj levi la ideon de potenciala kunlaboro inter la ĉina junulara movado kaj la "ekstera mondo."

De la 13a ĝis la 14a de novembro sukcese okazis rete la 39a Komuna Seminario (KS), kies organizanto estis japanaj junuloj. La ĉi-jara temo estis: "La okuloj ilin ne vidas, sed...! -kronviruso kaj ni-." Povis fine okazi la KS malgraŭ tio, ke estas longdaŭraj problemoj pri la agado de Japana Esperanto-Junularo (JEJ).

TEJO ankaŭ anticipas aliĝon de potenciala nova landa sekcio el Indonezio: fine de 2020 formale submetis sian aliĝpeton Indonezia Esperantista Junulara Organizo (IEJO). La aliĝprocezo estis prokrastita pro nekompletaj dokumentoj kaj malfacilaĵoj pri komunikado. La aliĝo estas daŭre pritraktata de trikapa laborgrupo, konsistanta el Michael Boris Mandirola, Hans Becklin, kaj Albert Stalin Garrido, kiu donis ampleksajn konsilojn pri amendoj en la Statuto de IEJO. Plej frue en februaro 2022 IEJO povus formale iĝi la plej nova landa sekcio de TEJO.

Menciinte IEJO-n, alia notinda afero estas pri "Brazindo", la ĉiumonata renkontiĝo inter Brazilaj kaj Indoneziaj junuloj. Okazigite de BEJO kaj IEJO, la unua renkontiĝo okazis la 16-an de oktobro 2021, kie 15 Brazilanoj kaj Indonezianoj ĉeestis rete. Poste, ĝis januaro 2022, okazis plu 3 ĝiaj sesioj, montrante la seriozecon de ambaŭ organizoj.

Eŭropo

Por Eŭropo ne estis LFA-komisiito.

Ameriko

Por Ameriko ne estis LFA-komisiito.

Informado

Retpaĝo

raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Estrarano pri Informado (2020-2021)

La Wordpress-bazita retpaĝo daŭre estas en kompatinda stato. La partoj en Esperanto funkcias, eĉ se fojfoje malfacilas fari ŝanĝojn. La alilingvaj partoj preskaŭ ne estas redakteblaj, kaj tio kaŭzis malsukceson de nia unua ANBI-peto en marto 2021. Livia kontrolis kaj korektis diversajn paĝojn fine de la jaro.

Kontakto

raportas Rogier Huurman (Roĉjo), Estrarano pri Informado (2020-2021), Rogener Pavinski, Redaktoro de Kontakto (2011-2021) kaj Paweł Fischer-Kotowski, redaktoro de Kontakto (ekde 2021)

Ŝanĝo de redaktoro

En la jaro 2021, post 10 jaroj kiel ĉefredaktoro de *Kontakto*, Rogener anoncis sian decidon forlasi la postenon en *Kontakto*, kio efektiviĝis en aŭgusto de tiu jaro, post la lanĉo de la numero 303 (2021:3). Eliris alvoko, tri bonaj kandidatoj estis intervjuitaj, kaj fine la Estraro ofertis la postenon al **Paweł Fischer-Kotowski** por almenaŭ unu jaro. Stela Besenyei-Merger kaj Rogener preparis manlibron kun instrukcioj pri tio, kiel funkcias la laboro ĉe la revuo. Ankaŭ Rogener kunvenis kun Paŭlo por klarigi specifajn detalojn pri la laboro kaj ĝis la fino de la jarkolekto 2021 Rogener restos kiel vic-redaktoro por helpi en la transira periodo. Kun Rogener ankaŭ malaperas la grafikisto, sed Rogener kiel vic-redaktoro komunikas kun la malnova grafikisto. Komence de 2022 devas aperi alvoko por nova grafikisto.

Sub Rogener en la jaro 2021 aperis tri numeroj (300, 301, 303) kaj ili prezentis la kutimajn enhavon, escepte de la plej lasta (303), en kiu, en la artikolo "10 Jarojn en Kontakto", Rogener prezentis resumon de tiuj 10 jaroj kiel redaktororo. La unuaj 3 numeroj ne aperis tiom akurate kaj pro la transiro de la ĉefredaktoreco aldoniĝis pli grandaj malfruoj, tiel ke por kompletigi la jarkolekton 2021 ankoraŭ nun mankas 2 numeroj.

La korektado kaj provlegado ŝuldiĝis al la teknika helpo de la TEJO-voluntuloj, Said Balouchi kaj al la eks-oficisto Rob Moerbeek. La Movada Rubriko estas prizorgita de Marcionilo Vasconcelos. La grafikan prilaboradon faris kiel kutime Romulo Felício. Ni tenis la konstantajn rubrikojn (*Intervjuoj*, *La Blaga Blogo*, *Tiel la Mondo*). En 2021 aperis nur 1-foje intervjuo rubriko kaj Paŭlo decidis ne plu daŭrigi ĝin.

En aprilo 2021, post la apero de la 300-a numero de *Kontakto*, Rogener estis intervjuita de Revuo Esperanto kaj aperis surkovrile.

Ĉefartikoloj en 2021:

2021.1 **Poŝtelefona Terapio** – Ĉu vi volas havi pli sanan rilaton kun via poŝtelefono?

2021.2 **Yves Desroisiers** – Kuraĝa Gesto

2021.3 **10 Jarojn en Kontakto**

2021.4 **Schwarzenegger** - Klimata Aktivulo

Intervjuoj en 2021:

2021.1 **Yves Desroisiers** – Kuraĝa Gesto

Movada Rubriko

raportas Marcionilo Vasconcelos, Redaktoro de Movada Rubriko (ekde aprilo 2018)

En la jaro 2021, la Movada Rubriko havis la sinsekvan eldonon de la Revuo Kontakto. Kvankam okazis malfruiĝoj en kelkaj eldonoj, tiu sesio ĉiam provis kontribui por la riĉigo de Kontakto entute. En ĝi aperis pluraj tekstoj kaj intervjuoj, kiuj provis havi pli ol novaĵojn pri la movado. La celo de ties eldono estis pritrakti temojn kiuj pripensigas niajn legantojn rilate al gravaj perspektivoj pri la junulara movado kaj pri la movado ĝenerale. Sekve estas listo de la numeroj aperigitaj kaj la ĉefaj temoj priparolitaj:

2021.1 – Por allogi homojn al financa kontribuo por nia asocio, estis prezentita intervjuo kun patronoj de TEJO, aperigo de novaĵoj pri nia movado, kaj prezento de novaj strategiaj planoj de TEJO.

2021.2 – Kun la ideo tuŝi gravajn agadojn de nia movado kaj prezenti pli bonan ideon pri genra egaleco ene de nia movado, tiu ĉi eldono aperigis intervjuon kun membroj de la genra egaleco de TEJO. Tiu ĉi eldono utilis por prezenti ilian laboron kaj varbi novajn homojn al la temo.

2021.3 – Tiu eldono prezenti novaĵon pri la komisiono de tejo kaj ties rolo, krom prezenti artikolon pri plendoj kaj proponoj por plibonigu de nia movado.

2021.4 – En tiu ĉi eldono oni prezentis materialon pri la krizo em Afeganio kaj invitis esperantistojn al helpo de la tieaj loĝantoj. Ankaŭ estis prezentita alvoko por komitatanoj de TEJO.

La numeroj 5 kaj 6 estas malfruaj, ĉar Kontakto ankoraŭ ne estas preta, do, pro tio ke Movada Rubriko sekvas la ritmon de kontakto, ni atendas la pretiĝon de la venontaj eldonoj por daŭre kontribui por la riĉigo de nia plej grava movada organo. Laŭ analizo de la lastaj eldono, eblas konstati ke MR daŭre strebas preni gravan rolon en nia movado, ĉar ĝi provas havi utilan rolon ene de kontakto kaj de nia movado.

Projektoj

Projektoj kun Konsilio de Eŭropo (KdE) (2020-2021)

raportas Spyros Papadatos, Oficisto pri Eksteraj Rilatoj (ekde 2019)

1) Klimata Generacio: Nia Planedo, Niaj Rajtoj, Nia Estonteco:

La projekto estas financata de la Junulara Fakto de la Konsilio de Eŭropo kunlabore kun la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo. TEJO sukcese kandidatiĝis por organizi studsesion

en la unua semestro de 2021. Studsesioj estas internaciaj edukaj junularaj seminarioj, daŭrantaj inter kvar kaj ok tagojn, kiuj kunvenigas membrojn de junularaj organizaĵoj aŭ retoj kaj spertuloj por diskutoj pri specifa temo kondukantaj al konkludoj rilataj al la prioritatoj kaj programoj de la junulara sektoro de la Konsilio de Eŭropo.

La studsesio de TEJO okazus ĉirkaŭ la temoj pri naturmedia daŭripovo kaj homaj rajtoj. La celo de ĉi tiu studsesio estus plifaciligi kaj enkonduki al niaj partoprenantoj la interligitajn temojn pri media daŭripovo kaj homaj rajtoj, precipe per la Edukado pri Homaj Rajtoj de CoE kaj la homaj rajtoj alproksimiĝo por ili pledi por klimata justeco kaj daŭripova estonteco. Ankaŭ por ili interŝanĝi opiniojn, sciojn kaj bonajn praktikojn kaj certigi reciprokan lernadon inter la junaj ĉeestantoj; Trejni junulojn kiuj estas relative novaj al la junula kampo kaj ankoraŭ ne precipe aktivaj en siaj socioj, sed ŝatus fariĝi pli aktivaj; Disdoni niajn partoprenantojn per la necesaj iloj, kapabloj kaj scioj por alporti la ŝanĝon en siaj lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj socioj kaj pledi por ilia estonteco, rilate al klimata pledado specife kaj rilate al homaj rajtoj ĝenerale.

La studsesio okazus en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo, Francio inter la 22-a kaj la 26-a de marto 2021 kaj ĝi estos plene fondita por 30 partoprenantoj. Tamen pro KOVIM-19 kaj la vojaĝaj limigoj, la agado devis esti ŝanĝita al interreta retejo, kiu okazis inter la 10a-30a de majo 2021. Ĝi estis organizita de 5 TEJO-membroj kaj 2 KdE-fakuloj kaj al ĝi aliĝis 24 junuloj el la mondo, kaj TEJO kaj ne-TEJO-partoprenantoj.

2) ALT_HRE: Alternativa Aliro al Edukado pri Homaj Rajtoj

La projekto estis financita de la Eŭropa Junulara Fondaĵo, kaj estis organizita kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj la Dana Esperanto-Junulara Organizo (DEJO). La agado estis origine planita okazi en Kievo, Ukrainio, en la somero de 2021, sed pro zorgoj pri KOVIM-19, la loko kaj la tempo estis ŝanĝitaj, okazante en aŭtuno, inter la 26-a de oktobro kaj la 2-a de novembro, en Ry, Danio.

La trejna kurso celis havi partoprenantojn esplori Homajn Rajtajn Edukon (HRE) kaj kiel ĝi povas esti kombinita kaj kunfandita kun alternativaj formoj de junula partopreno kaj Ne-formala Eduko: artivismo kaj teatrologio. La partoprenantoj de la 5-taga trejna kurso lernis kiel disvolvi siajn kompetentecojn kiel HRE-multiplicantoj dum organizado de agadoj de, kun kaj por junuloj, kiel HRE en 2021 povas progresi kaj esti kombinita kun alternativaj formoj de junula partopreno kaj NFE, kaj produktis ilaro kun ekzemploj de agadoj disvastigendaj inter junularaj organizoj kaj gejunuloj ĝenerale. Post la fino de la aranĝo, la partoprenantoj povos diskonigi la rezultojn de la internacia agado, multoblige ĝin en siaj lokaj societoj kaj ankaŭ praktiki la sciojn kaj kapablojn, kiujn ili akiris dum la fizika agado.

La trejna kurso estis kapablo-konstruado, kapablo-disvolvado kaj interkonekta ŝanco por la partoprenantoj, kiuj estis 20 junuloj el KdE-membroŝtatoj, aktivaj en siaj lokaj socioj kaj

dediĉitaj kaj spertaj en la homaj rajtoj/junularaj rajtoj. La trejnkurson faris 2 spertaj trejnistoj kaj estis subtenata de organiza teamo konsistanta el 2 TEJO-anoj.

3) X-Lingvo 2: la efiko de seksismo en ĉiutaga komunikado

La projekto estis financita de la Junulara Departemento de la Konsilio de Eŭropo (KdE) kunlabore kun la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto. TEJO sukcese kandidatiĝis por gastigi studsesion en la dua semestro de 2020, kiu, pro KOVIM-limigoj, estis finfine adaptita al reta agado okazinta en septembro 2020. Ĉi tiu fizika studsesio estis la rezulto de resendo de la projekto kaj okazis inter la 6-a-10-an de decembro 2021. En tiu ĉi aranĝo partoprenis 26 junuloj el diversaj landoj, kun organiza teamo konsistanta el 5 TEJO-anoj kaj unu konsilisto de KdE.

La reta agado servis kiel enkonduko al la bazaj temoj, kiujn oni bezonis plu diskuti dum la fizika studsesio (homaj rajtoj, sekso, seksismo kaj parola komunikado), uzante rimarkojn kaj rekomendojn de la partoprenantoj por formi la enhavon de la studsesio. La fizika studsesio koncentriĝis pri plua esplorado de ĉi tiuj temoj donante al niaj partoprenantoj la ŝancon lerni, interŝanĝi spertojn, scion kaj instigi ilin ekagi reen en siaj lokaj komunumoj, retoj kaj organizoj, substrekante la kialon kial lingvo ludas kritikan rolon en kontraŭbatalado de seksismo, kaj kiajn ilojn ni havas por atingi ĉi tion.

Projektoj sub Erasmus+ (2021)

raportas Carlos Pesquera Alonso (Karlos'), Subvencipetisto (ekde septembro 2021)

Neniu projekto kadre de Erasmus+ okazis en 2021.

Talento

raportas Nicolas Kasolene (Nickson), Komisiito pri Talento (ekde septembro 2020)

Post la reaktivigo de la komisiono ekde septembro 2020 de la respondeca Estrarano Klára Ertl, la komisiono stariĝis kaj atingis sukceson. Konforme al la agadplano, la komisiono plenumis multajn el siaj planitaj taskoj, interalie la aktivigo de la komisiono mem pere de organizado de monataj renkontiĝoj, serĉado de novaj aktivuloj helpante al ili trovi taŭgan rolon ene de TEJO, kontaktigante ilin kun la ĝustaj homoj, grupoj kaj trejnadaj.

Ni laboris pri la starigo de mentora programo por komisionoj, novaj landaj sekcioj, kaj dormantaj landaj sekcioj de TEJO.

Aktive, ni efektivigis intencan kunlaboron inter la sub-komisionoj de Talento (Talentaro). Kaj unu el la fruktoj de tiu konlaboro estis la starigo de la projekton "Tandemo", kunlabore kun David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri branĉo Liberen, ni celis kunvenigi du partoprenantojn el diversaj partoj de la mondo por interŝanĝi, uzi Esperanton, fari sugestojn pri agadoj kune kaj partopreni enretaj aranĝoj.

Ni ankaŭ ricevis diversajn taskojn el ekster la komisiono, interalie la pritraktadon de la kandidatiĝoj por la Volontula Programo de TEJO por decembro 2021.

Raporto pri la komisiono estis verkita je la fino de la estrarana mandatperiodo 2020-2021, kaj finfine transdoni la Komisionon al la nova Estrarano pri Talento en septembro 2021.

Egaleco (2021)

Genra Egaleco

raportas David López Rueda kaj Luana França, Komisiitoj pri Genra Egaleco (ekde majo 2021)

Jam dekomence de la jaro, komisionanoj kontribuis diversmaniere en aranĝoj kaj aliaj platformoj. Pro instigo de Ariel, ni pretigis mesaĝojn por transdoni ĝin en la sociaj retejoj de TEJO nome de nia komisiono okaze de la Internacia Tago de Virinoj en marto kaj Internacia Tago kontraŭ Glatfobio en majo. Ni ankaŭ sendis nian unuan aprobitan malneton de gvidlinioj por retaj aranĝoj al organiza teamo de Retoso por ke ili estu kosideritaj. Ni sukcesis **publikigi artikolon por la Movada Rubriko**, surbaze de intervjuo al membroj de la komisiono. **Dum Retoso okazis trejnado pri Senperforta komunikado gvidita de Klára** kaj ankaŭ Jana Suna gvidis diskutrondon.

En majo de 2021, post kunsido kun la komisiito pri Egaleco, Euleax, Luana kaj David ekprenis la rolon de komisiitoj por ĉi tiu branĉo sub la gvido de Klára, la estrarano respondeca de la komisiono. De tiam ni kunsidis kun ŝi por preparoli la taskojn kaj agadojn de la komisiono ĝis septembro, kiam Inès iĝis la nova respondeculo.

Intertempe ni daŭrigis, ekis kaj finis plurajn agadojn. Jen la plej gravaj. Ni daŭrigis la kunlaboradon kun la branĉo pri Alireblo, pri kiu respondecas **Soraya. Kun ŝi, ni pli prilaboris la dokumenton pri gvidlinioj por retaj aranĝoj**, kiun ni ekigis dum marto-aprilo danke al kontribuoj kaj komentoj de pluraj komisionanoj. La celo estis krei inkluzivajn kaj egalecajn konsilojn por la estontaj aranĝoj. Fine la jaro, la komisiono eĉ komencis prepari kaj diskuti la adapton de la gvidlinioj pri egaleco kaj alireblo por ĉeestaj aranĝoj celante kaj atendante la revenon de novajn eventojn, sed pro la pandemio la okazo de tiuj aranĝoj ne venos tiom frue.

Por la Virtuala Kongreso kaj la IJK, ni prilaboris proponon pri programero por tiuj eventoj. Kune kun Alireblo kaj Tutmonda Egaleco ni pretigis demandaron por scii pli pri kio okazas en Esperantujo rilate al la temoj de egaleco, alireblo kaj pandemio, ĝenerale. Post disvastigo kaj analizo de la respondoj al la demandaro, ni fine pretigis programeron kaj partoprenis ambaŭ kongresojn per komuna diskutrondo, kiu tiris la atenton de pluraĝaj homoj.

Kiam la nova estraro komencis labori sub la gvido de Inès, ni reprenis la ideon oficialigi la gvidliniojn pri aranĝoj kaj alvokoj kaj ekis amendproponon kun la helpo de Michael-Boris. Temis fakte pri amendpropono pri mafermaj alvokoj al la Ĝenerala reglamento. Ni sukcesis voĉdonigi la komitaton kun la celo aprobigi la proponon kaj dume videbligi la gravecon de ĝi. La diskuto pri la amendpropono daŭras kaj vigliĝas. Krom tio, ni daŭre kunlaboras en la provlego de traduko de la trejnado Projekto X-lingvo.

Tutmonda Egaleco

raportas Rafael Lima, membro de Tutmonda Egaleco (marto 2021 - septembro 2021)

La subbranĉo Tutmonda Egaleco iom aktivis dum la jaro 2021. La estrarano Klára invitis novajn volontulojn kaj kelkaj partoprenis en la kunsidoj de la subbranĉo. Inter ili estis Batuhan Bozar, Ori Beiser (Jozefo) kaj Rafael Lima.

Ni okazigis diskutrondon ĉe VK. https://www.youtube.com/watch?v=_qzLbBpEPJc

Ni kunorganizis la Demandaron pri Egaleco en la Esperanto-Movado. <https://www.tejo.org/en/demandaro-pri-egaleco-en-la-esperanto-movado/>

Ni organizis bankon kun frazoj, difinoj kaj tekstetoj pri rilataj temoj, kiel Diskriminacio, Interkultura Dialogo, Interkultura Komunikado, Kulturo, Interkultura Kompetenteco, Lingva Mondkoncepto, Lingva handikapo/malfido. La banko estis kunhavigita kun membroj de la komisiono. La ideo estis havi uzeblajn frazojn por verki tekstojn, filmetojn, afiŝojn. https://docs.google.com/spreadsheets/d/1cr22826eE_L8-YLUEgmDhWPzEjo_8IlbGrXK-iXQo8M/edit#gid=0

Ni faris kampanjon por publikigi artikolserion pri la vivo de homoj en malsamaj kulturoj, kaj por tradukado de artikoloj en Vikipedio. Tamen, homoj ne respondis. <https://www.tejo.org/en/verku-por-tutmonda-egaleco/>

Ni kunigis ideojn de diskutrondoj pri rilataj temoj. https://drive.google.com/drive/folders/1GZ7bFtqJqUwti2s4lYbXLo8CcyHiJN_v

Alireblo

raportas Soraya Alvarez, Komisiito pri Alireblo (ekde oktobro 2020)

Ekde la komenco de la jaro, la komisiono emis labori pri du ĉefaj projektoj: Parolata Vikipedio kaj voĉlega versio de la revuo Kontakto. Renato Filho precipe prilaboris la unuan projekton kaj eĉ kreis filmeton pri kiel voĉlegi por Vikipedio. La dua projekto ankoraŭ estas prilaborata.

La komisiono ankaŭ kunlaboris kun Genra Egaleco dum la IJK en la programero "Egaleco dum Pandemio". Aldone, ni ekkunlaboris kun la komisiono por handikapecak rajtoj de BEJO kaj Soraya partoprenis en podkasto de BEJO por varbi kaj divastigi la agadon de Alireblo.

Liberen

raportas David Ruíz i Sánchez, Komisiito pri Liberan (oktobro 2020 - marto 2021)

La subbranĉo pri egaleco *Liberen* fine ĉesis sian aktivadon en aprilo post la finado de la ne realigata *Projekto Tandemo*, kreita inter kelketaj aktivuloj de la komisionoj pri Talento kaj Egaleco, sed tamen ni havis la lastan retkunvenon en Februaro por finpretigi ĝin. Post tio, la subbranĉo mortis kaj malaperis pro manko da homfortoj, tempo kaj emo.

Adoleska Agado

raportas Briac Millon (Brijako), Komisiito pri Adoleska Agado (2020-2021)

La komisiona branĉo pri adoleska agado organizis programerojn por adoleskuloj dum JES, Retoso, IJK-2021. La programero dum JES devis esti interkona kunveno por adoleskuloj, sed pro nesufiĉa kaj tro malfrua reklamado neniu venis kaj ĝi do flaskis. Dum Retoso samtipa programero estis proponita kaj ĉi-foje, ĉirkaŭ 20 homoj ĉeestis, la plejparto de ili estante adoleskulojn. Dum IJK-2021, du programeroj estis proponitaj : programero pri lernejoj dum la pandemio, kaj ludo ("[ĉesu](#)"). Sufiĉe multaj homoj partoprenis en tiuj programeroj, sed ne multaj adoleskuloj. Plie, ideo por videbligi esperantistajn adoleskulojn estis publikigita ĉe la kanalo de TEJO en Youtube.

Apendico

Kromnomoj de personaj nomoj

Alekĉjo	Alexandre Raymond
Ariel Palmer	Giorgio Nikolov
Brijako	Briac Millon
Feliĉa	Mung Bui
Karlos'	Carlos Pesquera Alonso
Manu	Emmanuel González
Marko	Marc Konijnenberg
Nickson	Nicolas Kasolene
Paŭlo	Paweł Fischer-Kotowski
Roĉjo	Rogier Hurman
Sasha Murr	Oleksandra Kovyazina
Snehaĝa	Snehaja Venkatesh
Tuŝka	Konstanze Schönfeld
Wojtek	Wojciech Oreszczuk

Mallongigoj de nomoj de organizoj, organoj kaj eventoj

AC	Advisory Council on Youth of the Council of Europe <i>(Konsilkonsilio pri la Junularo de Konsilio de Eŭropo)</i>
AKSO	Administra Komuna Sistemo Organiza
ALT_HRE	An Alternative Approach to Human Rights Education <i>(Alternativa Aliro al Edukado pri Homaj Rajtoj)</i>

ANBI	Algemeen nut beogende instelling (<i>Publika Utila Organizo</i>)
AT	Aktivula Trejnado
BEJO	Brazila Esperanta Junulara Organizo
CO	Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo)
CoNGO	Conference of Non-Governmental Organizations in Consultative Relationship with the United Nations (<i>Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Konsulta Statuso kun UN</i>)
ĈJEA	Ĉina Junulara Esperanto-Asocio
DEJO	Dana Esperantista Junulara Organizo
EACEA	Education, Audiovisual and Culture Executive Agency (<i>Eduka, Aŭdvida kaj Kultura Plenuma Agentejo de EU</i>)
E@I	Edukado@Interreto, Esperanta organizo en Slovakio https://ikso.net/eo/
EKC	Esperanto Kultur-Centro de Tuluzo (Francio)
EKOSOK	EKOnomia kaj SOcia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj
ESK	Eŭropa Solidara Korpuso, la nova volontula servo
EsKu	Estrarkunsido
EU	Eŭropa Unio
FoJE	Forumo Junulara Eŭropa
HRE	Human Rights Education (<i>Edukado pri Homaj Rajtoj</i>)
ICH	Interkultura Centro Herzberg
IEJO	Indonezia Esperantista Junulara Organizo
IJK	Internacia Junulara Kongreso

IKRJO/ ICMYO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj <i>International Coordination Meeting of Youth Organisations</i>
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IRIS	Internacia Reta Interfaka Simpozio
JEFO	Junulara Esperanta Franca Organizo
JEJ	Japana Esperanto-Junularo
JES	Junulara Esperanto-Semajno
KdE	Council of Europe (CoE) <i>(Konsilio de Eŭropo)</i>
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KODEJO	KOMpleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj
KoKu	Komitatkunsido
KOMEM	Council of Members (COMEM) <i>(Konferenco de Membroj)</i>
KS	Komuna Seminario
KKPS	Klaĉ-Kunveno Post-Somera
LDC5	The Fifth UN Conference on the Least Developed Countries <i>(5a Konferenco de UN pri la Malplej Evoluigitaj Landoj)</i>
LFA	Landa kaj Faka Agado
MEJA	Malaga Esperanto Junulara Asocio
MR	Movada Rubriko
NEJ	Nederlanda Esperanto-Junularo
NFE	<i>Non-Formal Education</i> <i>(Neformala Edukado)</i>
PEJ	Pola Esperanto-Junularo

PP IJK	Partoprenu IJK-n
SEJ	Senegala Esperanto-Junularo
SKEJ	SlovaKia Esperanto Junularo
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TORPEDO	Tutlanda Oktobra Renkontiĝo Pedagogia
TTR	TEJO-Trejnista Renkontiĝo
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UIA	Unio de Internaciaj Asocioj
UK	Universala Kongreso
UN	Unuiĝintaj Nacioj
Unesko	United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization (UNESCO) <i>(Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo)</i>
UNITED	<i>UNITED for Intercultural Action</i> (Unuiĝintaj por Interkultura Agado)
UNOY	<i>United Network of Young Peacebuilders</i> (Unuiĝinta Reto de Junaj Pacokonstruantoj)
VK	Virtuala Kongreso (reta UK)
VOLADE	Volontulado kaj asocia daŭripov-evoluo
VolDom	Volontula Domo